

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Esperanto

113-a jaro • n-ro 1345 (4) | aprilo 2020



ISSN 0014-0635

**Antaŭ 100 jaroj
forpasis H.Hodler | 75**

**UK: Unua
rigardo al la programo | 84**

La membraro de UEA en 2019 | 95

Esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio
(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)
Fondita en 1905 de Paul Berthelot
(1881-1910). Establa kiel organo de UEA en 1908
de Hector Hodler (1887-1920).

Misio:

Kvazaŭ anteno kaptanta la tendencojn, la ardon,
la aspirojn de la esperantoj ĉiulande, la revuo
Esperanto prezentu aktualan, interesan, inspiran
bildon pri la agado kaj strategio de UEA kaj pri la
evoluo de Esperanto en monda skalo.



Redaktoroj: Dmitrij Ŝevĉenko, Anna Striganova
Korektistoj: Rob Moerbeek
Sur la kovrilpaĝa foto: Hector Hodler

Adreso de la Redakcio:
Revuo Esperanto
Universala Esperanto-Asocio
Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ
Rotterdam, Nederlando
tel.: +31 10 436 1044
<http://revuoesperanto.org>
redakcio@revuoesperanto.org

Aperas: en ĉiu monato krom aŭgusto.

Legata en 120 landoj.

Voĉlegata por vidhandikapitoj.
Abonprezo: varias laŭlande;
informiĝu ĉe via landa asocio aŭ ĉe la CO.
Unuopa ekzemplero kostas EUR 4,00.
Ĝenerala Direktoro: Martin Schäffer

Anonctarifo (EUR):
1 p. 1000, 1/2 p. 550, 1/4 p. 300,
1/8 p. 165, 1/16 p. 90.
Movada rabato 50%.

Anoncoj sur ekstera kovrilo kostas duoble.

Rabato por tuja ripeto 20%.

Anoncoj: 2€ por ĉiu vorto (oni ĉiam fakturas
minimуме €20,00). Mendu ĉe la CO.

Transpagaj informoj:

Banko: ING, Postbus 1800, NL-1000 BV Amsterdam

Bankokonto: IBAN: NL72 INGB 0000 3789 64,

BIC/SWIFT: INGBNL2A

(Universala Esperanto-Asocio en

Rotterdam, Nederlando)

PayPal: financoj@co.uea.org



Adreso de la Centra Oficejo de UEA:

Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ

Rotterdam, Nederlando.

tel.: +31-10-436-1044

uea@co.uea.org www.uea.org

Enhavo



75

La klarvido de Hector Hodler

La resumo de la artikolo de Ulrich
Lins pri Hector Hodler, kiu antaŭ 112
jaroj fondis Universalan Esperanto-
Asocion.



79

Hector Hodler kaj la revuo Esperanto: ciferece por la mondo

La Nacia Biblioteko de Aŭstrio cifere-
cigas materialojn. Jen unika okazo ko-
natiĝi kun la artikoloj de Hodler dum lia
redaktora periodo.



82

Korona viruso, Kongresa Universitato kaj nova filatela retejo

Daŭrigo de la rubriko *Fake, Science kaj
Profesie tra la mondo*, lanĉita en la antaŭa
numero.



84

Unua rigardo al la programo

La tempo pasas... multaj esperantistoj
interesiĝas pri Montrealo, antaŭĝojas
renkonti siajn geamikojn dum la kong-
reso kaj amikiĝi kun novaj homoj. Sed
kion enhavos la kongreso?

Malferme | 78

*Hector Hodler, pacisma
sinteno*

Jen la titolo de nova libro
aperonta en julio 2020

Primedtitindaj paĝoj (1916) | 80

Laste Aperis | 81

Oficiala Informilo | 86

Afriko brilas | 87

Letero el Goma

Landa agado | 88

"Teo kaj Amo:
Interkultura Dialogo"

Recenzo | 89

Rado de vivo

Evento | 90

La 14-a Mediteranea
Esperanto-Semajno en
"Les Issambres"

Recenzo | 91

Etaj brikoj en la muro...

Reta Revuo kalejdoskope | 92

Kalejdoskopo | 93

Esperanto en | 94

universitatoj
Seminario pri
interlingvistiko kaj
planlingvoj

Evento

Komuna staĝo inter koreaj
kaj tajvanaj esperantistoj
malgraŭ minaco de la
korona viruso!

La membraro de UEA | 95
en 2019

Estraro
de Universala
Esperanto-Asocio

Prezidanto: D-ro Duncan Charters
(Kunordigo, Strategio, Instruado, Rilatoj
kun ILEI)
PO Box 100, Elsayh, IL 62028, Usono
Tel. +1 618 374 5252
uea-prezidanto@esperanto.org

Vicprezidanto: S-ro Fernando Jorge
Pedrosa Maia Jr. (Centra Oficejo, Statuta
Reformo, Eksteraj Rilatoj [krom Unesko],
Ameriko, Rilatoj kun TEJO, Rilatoj kun
Membro-Organizoj)
R. Andrade Pertence 42/503 Rio de Janeiro
RJ Brazilo 22220-010
Tel. +55 21 967767084
fmaiajr@gmail.com

Vicprezidanto: S-ro Trezoro Huang Yinbao
(Financoj, Unesko)
Esperanto-Centro Ora Ponto
Jingchuan-Xian, Jinqiao Guojij, 744300
Pingliang, Ĉinio
Poŝtel. +86-1889316800
trezoro@qq.com

Ĝenerala Sekretario: S-ro Aleks Kadar
(Administrado, Ĝemelaj Urboj,
Esperanto-Centroj, Eŭropo, Revuo
Esperanto)
197 rue de Lourmel
FR-75015 Paris, Francio
Poŝtel. +33 6 86 58 00 20
alekska@gmail.com

Membro: D-ro Orlando E. Raola
(Kulturo, Kongresoj, Biblioteko,
Eldonado, Esploro kaj
Dokumentado, Terminologio)
975 S Eliseo Drive, apt. 10, Greenbrae,
CA 94904, Usono
Tel. +1-707-527-4660
oraola@gmail.com

Membro: S-ro Jérémie Sabiyumva (Afriko,
Aktivula Maturigo)
BP 170 Rumonge, Burundo
Tel. +257 79218342 / 69066457
jerrybs21@gmail.com

Membro: D-ro So Jinsu (Azio, Oceanio, Informado
kaj Amikoj de Esperanto)
Mapo-gu Tojeong-ro 158, Hangang Bamsseo
Xi Apt. 102-2401, Seoul 04080 Koreio
Tel. +82-10-8898-1818
so@kangnam.ac.kr

Membro: D-ro Amri Wandel (Scienca kaj Faka
Agado, Meza Oriento kaj Norda Afriko, IKU)
767 Makabim, 7179901 Modiin, Israelo
Tel. +972-54-454-8712
amriwandel@gmail.com

Observantoj de TEJO:
S-ro Abel Johannes Kieft kaj s-ino Tran Thi
Hoan (Gojo)

Observanto de ILEI:
S-ino Mirejo Grosjean

Pli detale ĉe:
<http://www.uea.org/asocio/estraro>

La klarvido de Hector Hodler*

Hector Hodler, kiu antaŭ 112 jaroj fondis Universalan Esperanto-Asociation, estis la filo de svisa pentristo kun intertempe monda famo. La patro, Ferdinand Hodler (1853–1918), devenis el malriĉa familio, kiu loĝis en vilaĝeto proksime al Bern, do la germanlingva parto de Svislando.

En Ĝenevo, la 1-an de oktobro 1887, naskiĝis Hector. Lia patro tiutempe ankoraŭ ne estis fama pentristo, kia li iĝis estontece. La patrino de Hector, Augustine Dupin, estis modesta kudristino.

Privat jene priskribis sian unuan renkonton kun Hector:

Kiam mi dekdujare eniris la gimnazion, mi tuj rimarkis tiun novan kamaradon, altan, malgrasan, malriĉan, kun mirindaj okuloj kaj senordaj brunaj haroj kronantaj lian belan grekan frunton. Lia neforgesebla figuro aperis sur pli ol unu pentraĵo de l' patro. Kiam ni kune elkuris el klaso je la kvara posttagmeze, Hector Hodler malgaje rapidis al la patra pentrejo sub tegmento por sidadi aŭ staradi terure senmove dum horoj kiel modelo.

La knaboj forte amikiĝis. Al Privat ni dankas priskribojn, kiuj iom klari-

gas la evoluon de la mondkoncepto de Hodler.

Iun tagon, en februaro 1903, Edmond venis en la klason kaj montris al Hector gramatikon de Esperanto, ricevitan de la patro. "Bonan tagon", li



diris al Hector, kredante lin surprizi per vortoj en nekonata lingvo. "Saluton!"

tiu respondis Esperante, kun brilo en la okuloj. "Ankaŭ mi eklernas, ĉar mi trovis lernolibron inter paperaĉoj."

Post tri semajnoj la amikoj jam flue interparolis. Ili fondis klubon kaj hektografitan gazeton, *Juna Esperantisto*, la unuan periodaĵon por lernejoj. La redakto estis sur la lernejaĵ benkoj, la presejo kaj bindejo sub lavitaj tukoj en la subtegmento de la domo de Edmond.

La aktivado ne estis limigita al la rondo de lernejoj. En 1906 Ĝenevo gastigis la Duan Universalan Kongreson (UK) – kaj ĝin plejparte organizis Privat kaj Hodler. Tiu kongreso verŝajne decide influis, ke Hodler de tiam tute dediĉu sin al Esperanto. Feliĉe, la patro intertempe akiris famon kaj estis jam riĉa. Tio ebligis al la filo vivon liberan de financaj zorgoj.

Fine de 1906 Hodler aĉetis de la franco Paul Berthelot la gazeton *Esperanto*, la nunan organon de UEA. La unua numero sub la respondeco de Hodler aperis la 12-an de februaro 1907. La gazeto servis al li kiel tribuno por aŭdigi sian opinion pri la Esperanto-movado.

La krizo en la Esperanto-movado, kiu spektakle esprimiĝis en la tiel

*Ĉi tio estas resumo de la artikolo de Ulrich Lins. La plenan tekston legu en la ĉi-jare aperonta libro *Hector Hodler, pacisma sinteno*. Pliajn informojn pri ĝi trovu en la sekva artikolo. (Red.)



nomata Ido-skismo, do la brua ĉesigo de la diskutoj pri reformoj en la lingvo, servis al Hodler kiel okazo por akcenti la urĝan neceson de organizo kaj la kreon de "Delegitaro", konsistanta el la reprezentantoj de la diversaj organizaĵoj esperantistaj.

Tiun proponon Hodler publikigis en sia revuo fine de 1907¹. Ĝi ne trovis reeĥon, parte pro tio, ke ĝi estis laŭdata ĝuste de Louis de Beaufront, kiun la esperantistoj konsideris la vera kulpulo de la Ido-skismo. Hodler pluevoluigis sian projekton de organizaĵo, limigante sin al preparoj por la fondo de asocio de tiuj esperantistoj, kiuj deziris ĉesigi teoriomadon kaj firme ekagi por uzado de Esperanto en la praktiko. Li pensis pri ne nepre vasta, sed demokrata asocio, kiu estu simpla, servopreta kaj malmultekosta.

La fondodato de UEA estas la 28-a de aprilo 1908, kiam estis akceptita la provizora regularo, kiun oni poste nomis statuto. La novkreita UEA konsistis nur el individuaj membroj, ĝi do ne estis bazita sur naciaj asocioj.

La membronombro de UEA konstante kreskis (en 1914 estis jam pli ol 7 000 anoj), kaj pli kaj pli grandiĝis ankaŭ la delegita reto.

La elirpunkto de Hodler estis la observo, ke la esperantistoj satiĝis pri la prilingvaj diskutoj kulminintaj dum la Ido-krizo kaj perdis la fidon je bal-

daŭa venkigo de Esperanto per la subteno de registaroj kaj aliaj aŭtoritatoj. Hodler mokis pri la uzo de nacia lingvo en grupkunvenoj kaj pri la kategorio de aprobantoj nesciantaj Esperanton. Kiel Privat skribis, lin ĉiam karakterizis "fiera kaj ironia malŝato al ĉiaj supraĵaj kaj ceremoniaj aproboj"² kaj li "fariĝis ofte senpacienca pri tiu teoria, propona flanko de nia movado"³. Hodler skribis plurfoje, ke la esperantistoj ne postkuru registarojn, sed per sia agado klopodu atingi, ke la registaroj turnu sin al ili⁴.

Li nomis pasintaĵo la emon proponi Esperanton kiel lingvon estontece utilan (nome kiam la tuta mondo estos ĝin alpreninta) kaj kontraŭmetis al tiu propaganda metodo la argumenton, ke Esperanto jam nun utilas kaj sekve estu senprokraste utiligata. Por respondi al tiu bezono kaj por plue evoluigi la utilon de Esperanto, estis kreita UEA: ĝi starigas servojn "tuj uzablajn de tiuj homoj, kiuj en tia aŭ alia fako partoprenas en la vivo internacia kaj bezonas rilati kun aligentanoj. [...] servojn por vojaĝantoj, por virinoj, por junuloj, por komercistoj, [...] La varbitoj lernos do Esperanton por ricevi la preparolitajn servojn, [...]"⁵

La kreo de UEA, laŭ Hodler, karakterizas do novan stadion, nome la transiron de predikado al praktiko – la stadion de esperantismo "enirinta en la vivon kaj ekzistanta per siaj propraj fortoj".

Hodler donis al la movado ideologion. Li difinis la esperantismon – diference de pure lingva movado laŭ la Deklaracio de Bulonjo – kiel unuavice socian, konstruan kaj progreseman movadon⁶. La praktikaj servoj kaj idealismaj celoj fakte formis nedisigblan unuon en UEA.

Hodler ligis la esperantismon al parencaj ideoj kaj movadoj kiel pacifismo/internaciismo, kion antaŭ kaj post li emis fari multaj esperantistoj. Sed neniu samtempe tiel insiste gardis la apartan profilon de la esperantistoj, la tute specifan kontribuon de la esperantistoj al la plibonigo de la internaciaj rilatoj.

En 1914 eksplodis la mondmilito, nelonge post kiam la komenca kon-

strulaboro en UEA estis sukcese finita. Ŝajnis detruigi ĉiuj esperoj pri kreo de mondo, en kiu homoj konsciu sin unue homoj. La revuo *Esperanto* devis interrompi sian aperadon. Sed Hodler ne lasis sin subpremi de malespero. Post malpli ol duona jaro li reaŭdigi sin kun optimisma antaŭenrigardo. Kvakam fino de la milito ankoraŭ ne videblis, li insistis en januaro 1915, ke la esperantistoj "estu la embrio de tiuj estontaj elitoj", kiuj post la milito rekonstruos la mondon, novan mondon de paco, "ne tiu paco, kiun diplomatoj enskribas en efemeraj traktaĵoj, sed tiu paco, kiu engravuriĝas en la koro de la homoj"⁷.

En tiu peza tempo Hodler ne multe parolis pri Esperanto. Tamen UEA imprese demonstris, je kio ĝi kapablas post nur ses jaroj de ekzisto. Utiligante la fakton, ke ĝi havis sian sidejon en la neŭtrala Svislando, UEA per sia delegita reto organizis grandskale helpagadon dum la milito, perante korespondaĵojn inter civitanoj de la malamikaj landoj kaj liverante nutraĵojn, vestaĵojn kaj medikamentojn⁸. Samtempe kun la praktika monstro de internacia solidareco, Hodler vigle kontribuis al la planado de la postmilita ordo.

Sub la titolo "La pacproblemo. Novaj vojoj" kelkaj ĉapitroj de la studo de Hodler aperis serie en *Esperanto* de julio 1915 ĝis februaro 1917⁹.

Ĉar Hodler kelkrilate anticipis tezojn, kiujn poste al pli vasta publiko prezentis la usona prezidento Woodrow Wilson, ni povas lin konsideri inter la teoriaj preparantoj de Ligo de Nacioj. Li multon atendis de Ligo de Nacioj, sed jam en decembro 1915 kvazaŭ profete antaŭdiris, ke la postmilita reorganizo de Eŭropo ne povas funkcii sur la bazo de la „gentoprincipo“, ĉar, kiel montras la historio, „regnoj formitaj konforme al la principo de la naciecoj rezignas tiun saman principon kaj rifuzas ĝin apliki al aliaj popoloj, kiam iliaj supozataj interesoj tion postulas"¹⁰.

Hodler ankaŭ frue atentigis, ke por efektiviĝi fundamentan transformon de internaciaj rilatoj ne sufiĉos starigi novajn jurajn regulojn. Tiuj reguloj

laŭ Hodler ne efikos, se ne samtempe transformiĝas la spirito de la homoj.


Oni povas vidi tie ĉi, ke Hodler aplikis al Ligo de Nacioj similajn kriteriojn por sukcesa funkciado kiel al UEA. Nome, en ambaŭ kunekzistu – kvazaŭ dialektika unuo – la organiza kohero kaj impeta idealisma penso. Ideoj per si mem ne kondukas al atingo de la celo. Ili povas doni kontribuon nur, se ili estas praktike elprovataj. Inverse, organizaĵo ne funkcias, se ĝin ne vivigas avangardaj ideoj.

Nemirige, ke Hodler bonvenigis la fondon de Ligo de Nacioj precipe el vidpunkto de la Esperanto-movado.

La espero, ke Ligo de Nacioj donos apogon al Esperanto, ne plenumiĝis. Hodler eĉ ne plu ĝisvivis la komencon de la klopodoj de la esperantistoj elbatali por sia lingvo rekonatan lokon en la mondorganizaĵo. Pro tuberkulozo, de kiu li longe suferis, li mortis la 31-an de marto 1920, nur 33-jara. La junaĝa amiko de la mortinto, Edmond Privat, en sia nekrologo por la revuo *Esperanto*, krom elstarigi la meritojn de Hodler, donis ankaŭ karakterizon de lia persono:

Multaj Esperantistoj memoras lian ĉeeston en diversaj kongresoj. Li ne estis parolema. Li estis modesta kaj senpretenda. Lia tono estis rekta kaj aŭtoritata. Li malŝatis ĉiun frazistecon kaj senutilajn vortojn. Sub lia maniero iom abrupta regis profundaj bonkoro kaj delikateco¹¹.

Senigita de sia plej proksima kunbatalanto, Privat multe klopodis por Esperanto ĉe Ligo de Nacioj. Ĉar li interpretis tie por gravuloj, li povis ligi kontaktojn, kiuj utilis ankaŭ al UEA.



Juna Esperantisto, No 2, junio 1903. El la Kolekto por Planlingvoj de la Nacia Biblioteko de Aŭstrio.

Akceptiĝis raporto de Ligo de Nacioj favore al Esperanto, sed tamen la Ligo ne faris decidon subteni la plian disvastigon de Esperanto – ĉefe pro la kontraŭstaro de Francio.

La esperantistoj bedaŭrinde poste emis turni al Ligo de Nacioj la dorson. Ili tro rapide kapitulacis antaŭ la malfortiĝo de internaciismo. Anstataŭ plue sekvi la admonon de Hodler, ke la esperantistoj pionire eduku al nova, internacia pensmaniero, ili koncentris sian rigardon denove pli multe al la agado en nacia kadro, direktante siajn esperojn al la unuopaj registaroj.

UEA do ne firme daŭrigis sur la vojo montrita de Hodler. Parte tio ŝuldiĝas al la skismo, kiu okazis en

1921, nome al la disduiĝo de “neŭtraluloj” kaj laboristoj. Temas pri la sekvoj de la fondo de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT). Ties fondinto, Eŭgeno Lanti, kiu en nekrologo pri Hodler nomis lin “nobla internaciisto”, fakte estis inspirita de Hodler rilate la ideon fondi asocion de individuaj membroj nedependan de naciaj societoj. Oni povas konstati, ke en la organiza strukturo de SAT konserviĝis eĉ pli de la originalaj impulsoj de Hodler, ol en la neŭtrala movado.

UEA havis en la unua postmilita jardeko garantiitan ekziston, ĉar li testamentis al ĝi grandan parton de sia havaĵo. La esperantistoj danke prenis tiun monon, sed ne la ideojn. UEA ekde la fino de la dudekaj jaroj alprenis pli kaj pli defensivan sintenon al la refortiĝinta naciismo kaj la timige disvastiĝanta faŝismo. Ĝi paralizis sin mem per false komprenata neŭtraleco, ne kuraĝante protesti kontraŭ ideoj kaj movadoj, kiuj minacis ne nur la pacon, sed la pluekziston de la homara civilizo. Kaj krom malatenti la spiritan heredaĵon de Hodler, la gvidantoj de UEA meze de la tridekaj jaroj forkonsumis ankaŭ lian kapitalon. Okazis nova skismo, ĉi-foje interne de la neŭtrala movado.

La sperto pri la persekutoj kontraŭ Esperanto en la Tria Regno kaj la antaŭenmarŝo de faŝismo fine tamen, jam antaŭ la Dua Mondmilito, konsciigis al UEA la limojn de neŭtraleco. Ĝi komprenis, ke Esperanto povas ekzisti nur en ĉirkaŭaĵo, kiu permesas aŭ almenaŭ toleras la strebon al interhoma komunikado. UEA, novfondita en 1947, deklaris sian ligiĝon al la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj kaj komencis kunlabori kun



Unesko, en kies konstitucia preamblo estas postulite – tute simile kiel Hodler diris – ke oni komencu la konstruon de la paco en la mensoj de la homoj. Intertempe kreskis la konscio pri la neceso enkonduki internaciismon en la ĉiutagan vivon.

La ideoj de Hodler ne estas bone konataj inter la nuna generacio de esperantistoj, kvankam multaj kutimi-

ĝis uzi la servojn kreitajn de li. Ili ne multe konscias, ke Hodler ne nur metis la bazojn por la praktika apliko de Esperanto, sed ankaŭ por la teoria difino de la agado por (kaj per) Esperanto.

La principoj, kiuj inspiris la junan Hodler, restas la fundamento de UEA. Tiu fideleco al la originaj principoj ne signifas pian respekton al la ideo he-

redaĵo de Hodler aŭ ian dogmiĝon en UEA, sed rezultas unuavice el la klarvida filozofio de la frue mortinta fondinto. Oni ofte agnoskas la geniecon de Zamenhof rilate la fundamentajn principojn de la lingvo Esperanto. Ni devus ne malpli kliniĝi antaŭ la genio de Hector Hodler, kiu kreis la plej grandan kaj plej longdaŭran organizan strukturon de la Esperanto-movado.

¹ H. Hodler, “La nuna neceso”, *Esperanto* 3. 1907, n-ro 21, p. 1. – Kp. G. Waringhien en *Leteroj de L.-L. Zamenhof II*, Paris: SAT, 1948, p. 98–99.

² Edmond Privat, “Hektor Hodler 1887–1920”, *Sennacieca Revuo*, n-ro 82, 1954, p. 1–4 (cit. 3).

³ Edmond Privat, “Kiel Hodler fondis UEA”, *Esperanto* 51. 1958, p. 55.

⁴ Hodler en *Esperanto* 10 [=9]. 1913, p. 377; H. Hodler, “Novaj perspektivoj”, *Esperanto* 15. 1919, p. 58.

⁵ H. Hodler, “Nova tempo. Novaj metodoj”, *Esperanto* 5. 1909, n-ro 49, p. 1.

⁶ H. Hodler, *L'espérantisme*, Genève: Universala Esperantia Librejo, 1911, p. 9.

⁷ H. Hodler, “Super”, *Esperanto* 12 [=11]. 1915, p. 2–3.

⁸ Hans Jakob, “La help-agado de UEA 1914–1918”, *Esperanto* 51. 1958, p. 55–57.

⁹ Represo, kun enkonduko de Andreas Künzli, estas: Hector Hodler, *Novaj vojoj*, red. Tomasz Chmielik, Świdnik: Libro-Mondo; Durđevac: Dokumenta Esperanto-Centro, 2014.

¹⁰ Hodler, *Novaj vojoj*, p. 52.

¹¹ Edmond Privat, „Morto de Hector Hodler“, *Esperanto* 16. 1920, p. 62.

Hector Hodler, pacisma sinteno

Jen la titolo de nova libro aperonta en julio 2020


■ Mireille Grosjean

Pro la malkovro de novaj dokumentoj kaj arkivoj aperas novaj facetoj de la personeco kaj agado de tiu granda majstro. Majstro, ĉar post la genia ideo de Zamenhof, la fondinto de Esperanto, Hodler vidis la bezonon de tutmonda strukturo por efikigi la agadon de la esperantistoj. Li evoluigis la ideon de «konsuloj» en diversaj landoj, kiuj nun nomiĝas delegitoj kaj agadas tra la mondo, konsistigante reton. En 1908 dank’ al liaj klopodoj estis fondita Universala Esperanto-Asocio, UEA. Tiu tute juna institucio povis tuj ekagi dum kaj post la unua mondmilito kune kun la Ruĝa Kruco por helpi al retrovo de familiaj membroj disŝiritaj tra Eŭropo pro la bataloj, fuĝoj kaj migradoj. La fakto, ke la Centraj Oficejoj de UEA kaj de la Ruĝa Kruco situis ambaŭ en Ĝenevo, kontribuis al tiu efika kunlaboro. Ankaŭ la neŭtraleco de Svislando helpis.

Tre interesaj kaj foje amuzaj estas la rakontoj pri la kunlaboro inter Hod-

ler kaj Edmond Privat, kiuj frekventis la saman lernejon kaj produktis dum la lecionoj sur siaj genuoj la gazeton *Juna Esperantisto*. La redaktejo estis en la subtegmento de la familio Privat, tie kie sekiĝis diversaj tukoj. Laŭ la instigo de Hector la du junuloj iris al la parlamento de la urbo Ĝenevo por observi politikistojn; ĉar Hodler moke imitis ilin, la pordisto forpelis la du knabojn energie kaj minace. Diversaj tekstoj de Privat kaj de aliaj ebligas trafan komprenon de la personeco de Hector.

Hodler fuĝis el ĉiuj kunvenoj kaj festoj kaj dediĉis sian tempon al verkado, analizoj kaj sintezoj. Abundas artikoloj el lia plumo. Li verkis en Esperanto kaj en la franca, por diversaj gazetoj kaj organoj. Li estis redaktoro de la Revuo *Esperanto*, kiu pro tio estas giganta fonto de tekstoj liaj. Li priskribas detale la manieron, laŭ kiu la esperantistoj prezentu tiun junan lingvon Esperanto. Liaj tekstoj montras lian suferon pro la milito 1914–1918 (li mortis en 1920). Ne ke li suferis fizike en bata-



lanta lando. Li konstatis la strategiojn de la batalantaj ŝtatoj kaj pripensis kiel krei ian federacion de ŝtatoj, kiu sukcesus solvi la konfliktojn sen atingi la pinton de krueleco: milito. Lia artikolo *Super* koncentriĝas al la esperantistoj, kiuj devas esti pioniroj en la kreado de harmoniaj kontaktoj inter la diversaj nacioj, ĉu dum ĉu fine de la milito.

Ni uzu la jaron 2020 por reiri al la fundamentaj analizoj hodleraj, kiuj tiom trafe priskribas la politikan situacion de la mondo, kaj ni trovu inspiron en liaj linioj por rezisti al malamikaj deklaroj de kelkaj nuntempaj ŝtatestroj. Post la epoko de Hodler la mondo ne fariĝis pli saĝa kaj la pionira agado de esperantistoj nepras. Ni estu kuraĝaj, kiel Hector estis.

Hodler ne nur fondis UEA-n, sed li multon skribis pri la ebla organizado de nova paca mondo postmilita, li esploris pri pacismaj strategioj kaj skizis la strukturon de la Ligo de Nacioj. Li estis samtempe altnivela intelektulo kaj efika, racia kaj konkreta aganto.

Pro tio liaj tekstoj aperontaj en nova libro prezentota en Kanado estas aparte interesaj kaj riĉigaj. La aŭtoroj de tiu nova libro estas Ulrich Lins, Christian Lavarenne kaj Marine Englert, kunlaborantino de la Arkivoj Jura Brüscheiler, kiuj portas la eldonprojekton. La libro provas prezenti ĉiujn facetojn

de tiu riĉa personeco, do esperantistoj malkovros multon kaj ankaŭ neesperantistoj (la libro aperos dulingve: en la franca kaj Esperanto). Tiuj personoj, kiuj deziras finance subteni la eldonadon, povas skribi al la aŭtorino de ĉi tiu artikolo: Mireille Grosjean.

Hector Hodler kaj la revuo *Esperanto*: ciferece por la mondo

Fernando Maia

Sendube unu el la plej gravaj laboroj por la teno de la memoro de Esperanto estas tiu farata en la Nacia Biblioteko de Aŭstrio (germane *Österreichische Nationalbibliothek*, el kio venas ĝia mallongigo ÖNB). ÖNB estas la plej granda biblioteko en Aŭstrio, kun pli ol 12 milionoj da eroj en siaj diversaj kolektoj, situanta en la centro de Vieno, kies komplekso inkluzivas kvar muzeojn kaj ankaŭ diversajn specialajn kolektojn. Ekde 2005 kelkajn el la kolektoj oni translokas en la konstruaĵon Baroque Palais Mollard-Clary, inter ili la Esperanto-Muzeon kaj Kolekton por Planlingvoj, fonditan en 1927 de Hofrat Hugo Steiner kaj ekde 1928 li-

gitan al ÖNB. Ĝi gastigas la plej grandan kolekton por planitaj lingvoj en la mondo kaj la bibliotekon por esploroj pri lingvoplanado. Entute temas pri ĉirkaŭ 35 000 bibliotekaj volumoj, 3700 periodaĵaj titoloj, 3500 kulturaj artefaktoj, 10 000 aŭtografoj kaj manuskriptoj, 22 000 fotoj kaj negativoj, 1500 afiŝoj kaj 40 000 broŝuroj. Proksimume 500 diversaj planitaj lingvoj estas dokumentitaj, el kiuj kompreneble la plej grava estas Esperanto.

Tiun imponan historion kaj laboron komplementas ĝia interreta katalogo, el kiu eblas konsulti plurajn verkojn ciferece. Sur la listo de jam ciferecigitaj materialoj estas pluraj libroj de Hector Hodler kaj ankaŭ la jarokolektoj de la revuo *Esperanto* ekde 1905 ĝis 1946 (kun ĉi-jara aldonado de la jaroj 1947 ĝis 1949). Temas pri unika okazo konatiĝi kun la artikoloj de Hodler dum lia redaktora periodo. Pro tio la Reta Revuo inaŭguros rubrikon por reaperigi tiujn historiajn tekstojn. La unua etapo de tiu laboro okazos inter aprilo 2020 kaj aprilo 2021 kun fokuso pri la artikoloj de Hodler.

Legantoj interesataj rekte konsulti tiun trezoron de nia memoro povas aliri: <https://tinyurl.com/y5sbffhe> (por libroj, serĉu Hodler) kaj <https://tinyurl.com/r8sl6gk> (revuo *Esperanto*). Aldone, en la virtuala ĉambro de ÖNB por legado de periodaĵoj, nomita ANNO, eblas legi i.a. pri Hodler ĉe diversaj eroj: <https://tinyurl.com/skgnj33>.

UEA volas gratuli al Bernhard Tuidar, teamestro de la Esperanto-Muzeo kaj Kolekto de Planlingvoj, cetere distingita per la Diplomo por Elstara Agado pasintjare dum la 104-a UK en Lahtio, Finnlando. Tiu distingo sen-



dube spegulas la laboron de lia tuta teamo kaj de la Esperanto-Muzeo dum sia historio. Ni fieras!

Societo Zamenhof

Aligu ankaŭ vi al tiu klubo de mecenatoj de UEA! Vi ricevos leterojn de la prezidanto de UEA kaj inviton al akcepto en la Universala Kongreso. La kotizon (duoblo de MA por via lando) vi povas pagi al via peranto aŭ rekte al UEA.

Pliaj informoj ĉe <https://uea.org/alighoj>



Walter Klag kaj Bernhard Tuidar en la Esperanto-Muzeo

Primedtitindaj paĝoj (1916)

■ Hector Hodler

(En Esperanto aperas la unuan fojon.
Trad. el la franca Mireille Grosjean)

Necesas organizi sin por militi; sed milito inter civilizitaj ŝtatoj nenion organizas. Ĝi anstataŭigas ĥaason per alia ĥaoso.

En la menso de la eŭropaj gvidantoj, sendepende de ilia grupa aparteno, la demando pri federacio eĉ ne aperas. Tamen en la anarkio, kiu nun regas inter la potencoj, nur ekvilibro povos ebligi, ke paco povu ekzisti iagrade. Evidente tiu sistemo ne estas perfekta kaj oni komencas konstati, ke, en tiom malstabila sistemo, la paco povas fiaski pro iu eta incidento. Nepras pensi pri nova ordo.

La organizaĵo, kiun la mondo bezonas, estos la rezulto de komuna orientiĝo de la voloj de ĉiuj civilizitaj ŝtatoj, kaj ne de perforto de unu nura ŝtato. La nura supera povo, kiun nacio povas konkeri, precize ĉar ĝi ne uzas la forton de la armiloj, estas intelekta aŭ ekonomia, kiel Francio en la dekoka jarcento en la literatura kampo, kiel Germanio dum la lastaj jaroj en la teknika kampo. Popolo povas nuntempe marki la civilizon laŭ siaj ecoj, per la pensado kaj laboro de siaj elitoj kaj ne per siaj armeoj.

Ĉu ni aŭskultu la politikistojn de la Aliancitaj Landoj, ĉu ni turnu nin al tiuj de la Centraj Imperioj, ni ne konstatas en iliaj deklaroj seriozajn kialojn por esperi, ke, post la venko de unu aŭ de la alia grupo, okazos transformo de la sistemo, el kiu la militoj fontas. Ĉar la pozitivaj kondiĉoj de daŭripova paco ne estas konataj, tiu paco ne povas esti sekurigita por pli-malpli longa daŭro. Ĝi absolute dependos de la cirkonstancoj, ĉar kiel antaŭe la mondo restos organizita por la milito kaj ne por la paco. La proponoj aŭditaj tie kaj ĉi tie ne celas la enkondukon de nova reĝimo; ili nur celas iujn modifojn duarangajn en la nuna stato. La milito ne estas atakata ĉe sia fonto. La malbono restas kompleta, ĉar la vera kaŭzo ne estas nuligita. Vane iuj diras, ke homoj ne plu deziras la militon. Ili ne plu deziras ĝin, tutcerte, (ĉu fakte ili deziras ĝin?) sed dum ili ne estos skuintaj sian jarcentlongan inertecon por nuligi la malbonan sistemon, kiu premas ilin, la homaro plu suferos de novaj militoj. Homo povas modifi la sistemon, sed se li tion ne faras, li devas submeti sin al ĝia leĝo. Kaj la leĝo de internacia anarkio estas milito.

*Tiuj meditoj aperis en la revuo «COENOBIUM»,
Lugano, Svislando, 1906-1919, vol I - XII*



Monumente pri Esperanto Hugo Röllinger

Ilustrita dokumentaro pri 1044 Zamenhof/Esperanto-objektoj en 54 landoj.
UEA, Rotterdam, 1997. 111 paĝoj, 24 cm. 6,00 €, triona rabato ekde 3 ekz.

Esperanta antologio

Poemoj 1887-1981. Red. William Auld.

Pli ol 850 originale verkitaj poemoj de 163 poetoj donas superrigardon pri la tuta poezia kulturo de Esperanto; kun postparolo de W. Auld kaj 36 paĝoj da biografiaj notoj.
12+888 paĝoj, 22 cm. Rotterdam, UEA, 1984 (2-a eld.). Prezo ĉe UEA: 9,00 €.



Laste Aperis

Adiaŭ, Krakovo! Mordeĥaj Gebirtig (Birtig). En Esperanton trad. M. Bronŝtejn. Bjalistoko / Świdnik / Kraków / Lublin: Ars-Libri / Bjalistoka E-Societo / Libro-Mondo, 2019. 254+65p. 24cm. Bind. Ilus. ISBN 9788363698331. Poemoj (kantotekstoj) en la originala jida kaj en Esperanto, de la juda "kantisto de mize-ro". En aparta broŝuro, la tekstoj de la kantoj en la jida, skribitaj per latinaj literoj. Kun partituroj. € 30,00

Alkemiisto, La. Paulo Coelho. El la portugala trad. C. Valle. Sanpaŭlo: Esprima, 2019. 474p. 7cm. Bind. Unu el la plej famaj verkoj de la aŭtoro. Surprizoplena aventuro tra la araba mondo. Numero 7 en la serio de minilibroj (7x5cm) "Nia Juvelaro". € 7,50

Beletra Almanako 36 (Oktobero 2019). Red. P. Daŝgupto, I. Ertl, J.L. Jacobsen, S. Moinhos, N. Ruggiero, A. Stecay. Novjorko: Mondial, 2019. 165p. 22cm. Ilus. ISBN/ISSN 9781595693969/19373325. Prozo kaj poezio (originalaj kaj tradukitaj), tradukita teatro, artikoloj, eseoj, recenzoj. € 9,90

Ĉu socialismo konstruiĝas en Sove-tio? (1935 / Laborista ŝtato, Termido-ro kaj bonapartismo. Historia-teoria esploraĵo (1932/35)). E. Lanti kaj M. Ivon/Leo Trocko. Embres-et-Castelmaure: MAS, 2019. 169p. 22cm. ISBN 9782369601913. Du samepokaj tekstoj rigardantaj al stalinismo. € 11,10

Flandra hundo, La. Nelo kaj Patraco. Ouida. El la angla trad. E. Raats. Embres-et-Castelmaure: MAS, 2019. 71p. 22cm. Ilus. ISBN 9782369602118. Dua traduko en Esperanto de kortuŝa, klasika romaneto pri la amikeco inter knabo kaj hundo. € 8,10

Historioj el Helmo. Menaĥem Kipnis. En Esperanton trad. T. Chmielik. Świdnik / Białystok / Lublin: Libro-Mondo / Bjalistoka E-Societo / Ars Libri, 2019. 130p.

24cm. Bind. ISBN 9788363698546. Rakontoj el la "ĉefurbo de stultuloj", aŭ, eble, "de saĝuloj". € 13,50

Inspiro / Vdāhnovenie. Hajkoj / Hajku. Elena Popova. Dobriĉ: Matador 74, 2019. 83p. 21cm. Kun kelkaj koloraj ilustraĵoj. ISBN 9789543716210. Freŝa kolekto de hajkoj en la bulgara kaj Esperanto. € 9,90

Inter imperiismo kaj revolucio. La bazoj de la revolucio ĉe la unuopa ekzemplo de Kartvelujo. Leo Trocko. El la germana trad. V. Lutermano. Embres-et-Castelmaure: MAS, 2019. 176p. 22cm. ISBN 9782369601999. Teksto de 1922. € 11,10

Karuseloj. Sara Larbar. Sanpaŭlo: Esp-rima, 2019. 488p. 7cm. Bind. Amromano, kiu disvolviĝas en brazila E-medio. Numero 8 en la serio de minilibroj (7x5cm) "Nia Juvelaro". € 7,50

Krubalo, La. Julia Donaldson. Ilustraĵoj de Axel Scheffler. En Esperanton trad. E. Grimley Evans, C.R. Brosch, T. Morley, D. Thomson. Barlaston: EAB, 2019. 31p. 27cm. Kolorilus. ISBN 9780902756397. Rakonto pri muso, kiu promenas en arbaro kaj lerte superruzas rabobestojn kiuj volas ĝin manĝi. € 7,20

Liberiĝo, La. Éva Tófalvi. Pécs: Akvila & Priscilla, 2019. 233p. 20cm. ISBN 9786150061108. La amrakonto inter hungara esperantistino kaj ĉeĥa esperantisto portas la leganton retroe al la komunisma orienta Eŭropo. € 24,00

Libro por BET-ano. Kompilis S. Marček, P. Jegorovas, A. Korĵenkov. Kaunas: LEA, 2019. 155p. 21cm. Ilus. ISBN 99556099508788. Speciala eldono por la 55aj Baltiaj Esperanto-Tagoj, Panevėžys, 2019. € 6,00

Momento de vero, La (En aŭgusto de la kvardek kvara). Vladimir Bogomolov. El la rusa trad. J. Finkel. Embres-et-Castelmaure: MAS, 2020. 451p. 22cm.


ISBN 978239602194. Ĉu milita detektivromano, ĉu spiona aŭ ĉu simple sovietia? Legu kaj mem decidu. € 19,50

Ne forgesu mian voĉon. Julian Modest. s.l.: Eldonejo Libera, 2020. 104p. 21cm. ISBN 9780244561819. Du freŝaj noveloj en kiuj amo ludas certan rolon. € 8,40

Perrefleksa terapio kiel memhelpo. Kion tuŝi, kiam io min doloras. Radka Dvořáková. En Esperanton trad. Z. Pluhař. Dobřichovice: KAVA-PECH, 2020. 67p. 21cm. Kolorilus. Bind. ISBN 9788088326052. Simpla rimedo por kvietigi irititan organon, malintensigi inflamon, malpliigi doloron. € 12,90

Tri knaboj, Krepuskulino kaj Terurul. Eva Vychodilová. Ilustraĵoj de Miroslava Zezulová. En Esperanton trad. P. Chdrle. Dobřichovice: KAVA-PECH, 2020. 12p. 24cm. Kolorilus. Bind. ISBN 9788088326069. Bele farita libro por infanoj antaŭ la puberago. Leginte ĝin, oni atingas la konkludon ke ĉio malbona estas por io bona. € 6,00

Zamenhofas – biografine apybraiža. Aleksandras Korženkovas. El Esperanto trad. R. Šuopys. Kaunas: Pasaulio lietuvių centras, 2019. 134p. 20cm. Ilus. ISBN 9786098167566. Konkizigita versio de *Homarano: La vivo, verkoj kaj ideoj de L.L. Zamenhof*. Kun notoj por la litovlingva publiko. € 6,00



La suprajn titolojn mendu ĉe la libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bv. atenti ke por varoj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio al ilia neta prezo aldoniĝas aldonvalora imposto: 9% por libroj kaj periodaĵoj kaj 21% por ĉio alia. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas sendokostoj: 10% (kun minimumo de 5,00 eŭroj) por ordinara sendo. La efektivaj kostoj por aldonaj servoj (prioritata/aerpoŝta, registrita, spurebla sendo) estas plene pagendaj de la kliento. Antaŭdankon pro via mendo! Ĝisdata katalogo de haveblaj varoj estas ĉe www.uea.org/katalogo.

Korona viruso, Kongresa Universitato kaj nova filatela retejo

■ Amri Wandel

La unuan artikolon en tiu ĉi rubriko, pasintmonate, mi malfermis per pluraj aspektoj de la viruso aperinta en Ĉinio, kiu intertempe fariĝis tutgloba, disvastiĝinte en preskaŭ ĉiujn landojn.

La nombro de infektitoj, kiu komence de marto estis 90 000, malpli ol tri semajnojn poste, la 18.03, superis 210 000 kaj la nombro de mortintoj proksimiĝis al 9 000, preskaŭ trioble ol en Ĉinio. En pluraj landoj la nombro de infektitoj atingis multajn milojn (vidu <https://tinyurl.com/woclz19>).

Ne eviteblas do ankaŭ ĉi-numere tuŝi tiun temon, kiu daŭre restas aktuala ankaŭ en Esperantujo.

La vasta agado de UMEA rilate la epidemion aperas en la intervjuo kun ĝia prezidanto Christoph Klawe, <https://tinyurl.com/scfn8j>. La Akademio plu diskutis la rekomendon de la Konsulejo, kronviruso/koronviruso. Iuj pledis por la tria varianto, koronaviruso, en radika formo. Mi plu uzas la varianton "koronaviruso", prefere en la formo "korona viruso", kiu plej similas al la internacia termino "coronavirus".

Organizantoj kaj aliĝintoj de pluraj internaciaj renkontiĝoj konsideras la eventualan efikon de la epidemia disvastiĝo. Evidente en la novaj cirkonstancoj ne povas okazi la Mezorianta Kunveno en Turkio (pri la Mezoriento vidu, ekzemple, la raporton – <https://tinyurl.com/w7z8qu5>).

Estis nuligitaj la Internacia Junulara Festivalo en Torino, la Hispana Kongreso (<https://eventaservo.org/e/1dBFJqPEeC876yFh>) kaj pluraj aliaj. La Israela Kongreso kiu devus okazi komence de aprilo en Tel-Avivo, estis prokrastita je unu jaro (vidu, ekzemple, <https://sezonoj.ru/2020/03/israelo-2/>). Intertempe UEA daŭrigas la preparojn por la UK en Montrealo, sed prokrastis la limdaton de la dua kotizaltiĝo je unu monato, ĝis la 01.05.2020 (vidu sube). Iom da espero tamen donas El Popola Ĉinio, kiu raportas pri la efika bremsado de la epidemio en Ĉinio (http://www.espero.com.cn/2020-03/17/content_75825296.htm).



Fonto: www.arcgis.com

Statistika analizo de la datumoj pli bone montras la evoluon de la epidemio. Komparante la nombrojn de infektitoj kaj resaniĝintoj mi verkis modelon, kiu prognozas la nombron

de novaj saniĝintoj. Eblas kontroli la prognozon en la afiŝoj de 01.03, <https://tinyurl.com/r4cmxef>, kaj 14.03, <https://www.facebook.com/groups/Universala.Esperanto.Asocio/permalink/1606775799488397/> kiuj ĝis la fermo de la n-ro, 18.03.2020, realiĝis ĉiutage. La blua grafikaĵo en tiuj afiŝoj komparas la datumojn de saniĝoj kun la modela prognozo, dum la flava montras la statistikajn tendencojn. En la Reta Revuo eblas sekvi la ĝisdatajn datumojn kaj la modelon ĉe: https://revuoesperanto.org/korona_viruso, kie troviĝas ankaŭ aliaj novaĵoj pri la monda epidemio kaj ĝiaj movadaj aspektoj.

La Internacia Kongresa Universitato en Montrealo

estos teme riĉa kaj havos plurajn novajn vizaĝojn, se juĝi laŭ la elektitaj temoj kaj prelegantoj. La IKU-komiso (Fiedler, Maitzen, Tonkin, Vergara, Wandel kaj Wen) ricevis 24 proponojn, el kiuj ĝi elektis naŭ por la IKU kaj sep por la Scienca Kafejo. La resumoj aperas en la IKU-paĝo de UEA: <https://uea.org/teko/IKU/>

IKU			
Goodall	Grant	lingvistiko	Alproprigo de dua lingvo: Ĉu ebla post la infanaĝo?
Alcalde	Xavier	Geopolitiko	Geopolitiko, remalkovrita fako
Dubourg	Glatigny Pascal	E-historio	Esperanto kaj la Dua Mondmilito: postmemora aliro al transnaciaj rakontoj
Greatrex	Geoffrey	Historio	Romianoj kaj persoj en la antikvo : milito, arto kaj kulturo
Lo Jacomo	François	Matematiko	La Ora Nombro
Mak	Bill	Historio	La Sciencoj Sur la Silkaj Vojoj
Raola	Orlando	Kemio	Kemiaj faktoroj en provizado de akvo por homaj bezonoj
Sayadpour	Keyhan	Medicino	Genetiko kaj Koro
Spinola	Carlos	Spacveturado	Veturado tra la interplaneda spaco

Scienca Kafejo			
Burghilea	Manuela	Komunikado	Komunikaj teknologioj en indiĝena aktivismo
Dankova	Natalia	Lingvistiko	Dualingva lernado kaj Esperanto-uzo depende de la patrolingvo
Du Temple	Wallace	Historio	La Kanada Odiseado, Lando de nekompletaj konkeroj
Huang	John	Esperantologio	La valoro de Esperanto en ŝanĝiĝanta mondo.
So	Gilsu	Simboloj	La svastiko en antaŭhistoria epoko
Striganova	Anna	Literaturo	Popolaj fabeloj kiel ilo por dialogoj kaj interkompreniĝo
Tytgat	Kristin	Lingvistiko	Bruselo, ĉu dulingva aŭ multlingva urbo?

La prelegoj de Grant, Lo Jacomo kaj Raola estos parto de AIS-kurso kun po du aldonaj prelegoj.

Unuafoje aperos en la IKU-libro ankaŭ la plenaj tekstoj de la Scienca Kafejo. Aldone, kiel pasintjare, troviĝos en la libro la prelegoj en la AIS-universitata sesio (SUS), okazonta kadre de la GEA-PEA-IFEF-kongreso en Frankfurto ĉe Odro fine de majo.

En la rubriko mi provos **ĉiufoje prezenti alian Fakan Asocion**. Pasintfoje ni iomete konatiĝis kun UMEA (medicinistoj), per ĝia informado pri la epidemio.

Ĉi-foje prezentas sian novan retejon la filatelistoj: Esperanto-Ligo Filatelista/Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj (ELF-AREK).

La kutimo krei kolektojn estiĝis en Esperantujo praktike ekde la Dua Libro de Zamenhof. Sed baldaŭ oni ne plu limigis sin al la libroj. Per la iniciato de individuoj, Esperanto-grupoj kaj asocioj, ekaperis Esperantaj glumarkoj, bildkarto, vizitkarto, kalendaroj kaj multaj aliaj. Esperantistoj komencis arigi ilin kaj, ekde 1912, ankaŭ poŝtajn stampojn,

poŝtmarkojn kaj ĉiajn oficialajn filatelaĵojn, kiuj kunportas ion pri Esperanto. Tiuj specialaj esperantaĵoj, kun ŝtata agnosko, aparte atingas multajn neesperantistojn: la filatelistojn.

Esperantaĵoj tra pli ol cent jaroj registris iniciatojn, helpis diskonigi la lingvon kaj pluvivigis la nomojn de aktivuloj, kiuj dediĉis sin al “la afero”. Tial la esploroj, kiujn faras kolektantoj, povas utili al Histori-amantoj. Esperanto-Ligo Filatelista/Amika Rondo de Esperantaĵ-kolektantoj, faka organizo kunlaboranta kun UEA, de pli ol 50 jaroj kunigas interesatojn pri la plej diversaj kolektofakoj per sia regula informilo “La Verda Lupeo”. La nova, refasonita retejo de ELF-AREK estas plena je bele ilustritaj artikoloj kaj estas alirebla al ĉiuj esperantistoj, kiuj ŝatas esperantaĵojn. Ĝi troviĝas ĉe la adreso <http://kolektado.esperanto.cc>. En ĝi oni trovas ankaŭ formularon por sendi komentojn kaj demandojn, kiujn bonvenigas aktivuloj de la organizo.

Laŭ la informoj de Elda Doerfler (Italio), prezidantino, kaj James Rezende Piton (Brazilo), retejestro.

Korona viruso kaj la 52-a Malferma Tago

Ni bedaŭras informi vin ke pro la progreso de la epidemio kaj sekvante la rekomendojn de la oficialaj instancoj de Nederlando, ni devas nuligi la okazigon de la 52-a Malferma Tago kiu laŭplane devus okazi 25.04.2020.

Ni studas eblojn por virtuala reta malferma tago, sed ni ne certas ĉu la bezonataj homfortoj povos veni al la CO. Pri la nova pria decido ni informos vin.

Orlando Raola kaj Said Baluĉi

Gazetaraj Komunikoj de UEA

La Estraro kunlabore kun la LKK, la Ĝenerala Direktoro kaj la Kongresa Fako, aperigis Gazetaran Komunikon pri la traktado de la koronavirusa epidemio rilate al la Universala Kongreso: <https://uea.org/gk/855a1>

Ĝi estis konigita ankaŭ en pluraj Facebook-grupoj, en Tvitero kaj en la Facebook-paĝo de UEA (<https://tinyurl.com/sepojgw>) kun ĝisdata raporto pri la stato de la epidemio tutmonde kaj ĝiaj aspektoj rilate al la UK.

En la speciala paĝo pri la korona viruso, https://revuoesperanto.org/korona_viruso, aperas jam pluraj informoj pri la epidemio: tradukitaj artikoloj, raportoj, statistika analizo kaj prognozaj pri estonta evoluo.

Pri la korona viruso kaj la UK en la paĝaro de LKK: <https://esperanto2020.ca/eo/koronviruso>

Dissendolisto “UEA-membroj” translokiĝas

Pro la drastaj ŝanĝoj kaj limigoj de la servoj por Yahoo-grupoj la dissendolisto “UEA-membroj” translokiĝis al la servo Groups.io.

Pliaj detaloj kaj aliĝo ĉe <https://groups.io/g/uea-membroj>





Unua rigardo al la programo

■ LKK por la 105-a UK en Montrealo

La tempo pasas... multaj esperantistoj interesiĝas pri Montrealo, antaŭĝojas renkonti siajn geamikojn dum la kongreso kaj amikiĝi kun novaj homoj. Sed kion enhavas la kongreso? Kio okazos? Jen – ekskluzive – unua rigardo al la programo!

Malkovru Montrealon, Kebekion, Kanadon!

Veturi al la UK-lando ĉiujare permesas malkovri novajn urbon, landon kaj kulturon. Kompreneble, vi multe lernos simple per via ĉeesto: marŝante, parolante kun lokaj esperantistoj (kaj eble ankaŭ neesperantistoj). Sed la Kongreso certe multe helpos!

Kanado estas lando ofte ne bone konata de la kongresanoj. La UK okazis en Kanado nur unufoje: en 1984 (en Vankuvero, milojn da kilometroj for de Montrealo). IJK okazis en Montrealo en 1992 (antaŭ preskaŭ tri jardekoj). Laste la UK okazis en la orienta parto de Nord-Ameriko en 1910, sed tiam kun la honora ĉeesto de Zamenhof!

Pluraj programoj helpas al la partoprenanto malkovri la landon. Lingvoŝatantoj estos en paradizo. Kebekio estas unikajo en la Nord-Ameriko, estante la sola loko en tiu mondoparto, kie la plej ofte parolata lingvo estas la franca. Montrealo, urbo kun lo-

ĝantaro el multaj landoj, estas ankaŭ fama pro sia lingva diverseco. Ofte oni aŭdas surstrate, krom la franca kaj la angla, ankaŭ la hispanan, araban, haitian kreolan, italan, ĉinan kaj rusan, por mencii nur kelkajn el la plej oftaj lingvoj. Dise tra Kanado ekzistas ankaŭ multaj indiĝenaj komunumoj. Kvankam nuntempe en multaj lokoj la ĉefa lingvo estas la franca aŭ la angla, pluraj konservas sian propran lingvon. Multaj indiĝenaj komunumoj historie suferis, sed nun pluraj el ili forte laboras por revigligi tiun neanstataŭigeblan parton de siaj kulturoj.


Prelegoj pri kanadaj politiko kaj historio do permesos al la partoprenanto pli bone kompreni la socion de la kongreslando.

Indiĝena konekto

La LKK planas okazigi Indiĝenan Serion, kiun reĝisoros Mark Fettes, la antaŭa Prezidanto de UEA kaj profesoro pri edukado kun aparta intereso pri indiĝenaj temoj. Estos prelegoj kaj diskutrondoj pri diversaj indiĝenaj temoj, interalie, ankaŭ pri la streboj revigligi indiĝenajn lingvojn de Kanado. Longe ignoritaj en la neindiĝena kanada socio, de pluraj jaroj indiĝenoj spertas kulturalan kaj politikan vekigon kaj iliaj temoj estas multe pli priparolataj ol en la pasinteco. Okazos ankaŭ diversaj artaj atelieroj, gvidataj de indiĝenaj artistoj.

Montreala Indiĝena Festivalo

Ni kongresos samtempe kun la fama Montreala Indiĝena Festivalo (<https://www.presenceautochtone.ca>), kiu okazos proksime de la kongresejo kaj en 2020 festos sian 30-jariĝon. Ni kunlaboras kun la festivalo tiel ke merkredon vespere vi povos sperti la plej ampleksan spektaklon pri la diversaj indiĝenaj nacioj, kiuj vivas en Kanado. Krome, indiĝenaj artistoj partoprenos la malfermon, la Nacian Vesperon kaj



aliajn programerojn dum la UK. Ĉu vi volas pli? Kunportu viajn tradiciajn vestojn kaj sabate la 8-an de aŭgusto (la lastan tagon de la UK) je la 16-a horo vi povos partopreni la Paradon de Nacioj, en kiu diversaj indiĝenaj popoloj de la tuta mondo povos marŝi kune, antaŭ la centoj da miloj da spektantoj. Normale, nur indiĝenaj nacioj povas partopreni, sed la organizantoj de la festivalo faris por ni specialan escepton, kaj esperantistoj rajtos partopreni la paradon kiel jen plia nacio! Fine de la parado okazos multetna spektaklo, kaj ankaŭ esperantistoj provos prezenti ion al la ekstera publiko. Vi estas bonvena spekti tion, eĉ se vi ne intencas paradi kun ni.

Lando de lingvopolitiko

Kanado estas lando de lingvopolitiko – do tre taŭga por esperantistoj! Ĝi estas dulingva je la federacia nivelo (la franca kaj la angla estas la oficialaj lingvoj). La franca estas oficiala en Kebekio. La UK do proponos prelegojn pri la lingva situacio de Kebekio el socipolitika kaj kultura vidpunktoj, kun fokuso sur la epopeo de la franca en la amerika kontinento. Oni ankaŭ prezentos la specifajojn de la kanadaj variantoj de la franca kaj angla.

Sed pli ol lingva komunumo, tiu ĉi mondoparto estas la koro de originala kulturo, kiu produktis filmojn, muzikon, teatraĵojn ktp. Estos do okazo lerni, interalie, pri la tre vigla francilingva muziko de Kanado dum interesa kaj muzikeca prelego.

Multkultura Kanada Vespere

Kiel tradicie, dimanĉe vespere okazos la Nacia Vespere. Ni ne volas jam malkovri al vi la tuton, sed tiu vespero bele kaj arte prezentos diversajn kulturojn, kiuj iom post iom konstruis Montrealon: indiĝenaj nacioj, francoj, kaj pli. Vi malkovros skizon de la loka historio danke al profesiaj artistoj. Ni certigas al vi memorindan vesperon!

Lasu la filmojn rakonti la landon!

La UK en Montrealo planas ion tute novan: Kanadan Salonon kaj Kongresan Kinejon! Temas pri ĉambro, kie okazos la kanada programo kaj



en kiu oni montras regule diversajn filmojn kanadajn, ĉefe danke al partneriĝo inter la UK kaj la Kanada Nacia Filmoficejo (NFO), unu el la plej ikonaj kanadaj institucioj, kiu kreis pli ol 6000 filmojn kaj gajnis nealkuleblajn premiojn, inkluzive de pluraj Oskaroj – ni montras kelkajn el la plej mondfamaj filmoj, inkluzive de tiuj de Norman McLaren: la legenda kanada filmfaristo, kiu gajnis Oskaron por la filmo, en kiu aperas... Esperanto! Volas scii pli? Venu al la UK! :) Interalie, oni montras filmojn pri kanadaj indiĝenaj komunumoj, kiuj permesos al la partoprenantaro konatiĝi kun realoj de Kanado ne ĉiutage videblaj en Montrealo.

Malkovru la urbon tra ekskursoj

Du antaŭkongresoj kaj du postkongresoj helpas al vi esplori du kulturojn kaj du belegajn partojn de Kanado – la francan (oriente) – kun la belega urbo Kebeko kaj la mondfama Charlevoix (natura rezervejo de Unesko) kaj la anglan (okcidente): kun Otavo – la bela kanada ĉefurbo, Toronto – la plej granda urbo, kaj, kompreneble, la famegaj Niagaraj Akvofaloj. Notu ke ekzistas maniero ekskursi pli malmultekoste ol kutime, per la elekto de “junulara” varianto de ekskursoj, kun la sama enhavo sed kun malpli kostaj loĝebloj. Ĉiu trovos ion en la programo de la tuttagaj kaj duontagaj ekskursoj: kulturemuloj kaj historiemoj, ŝatantoj de la naturo, scivolemuloj pri la tradicia kebekia sukerkabano... la dilemo estos elekti! Vidu ĉion pri ekskursoj en la Dua Bulteno: https://uea.org/pdf/uk2020/DB_Montrealo_malpeza.pdf

Kongresa temo: la 75-jariĝo de UN

Ĉu vi scias, ke Montrealo estas urbo de internaciaj organizoj? Se vi venos al la urbo aviadile, sciu, ke la ĉefaj reguloj, kiuj organizas internacian aviadilan vojaĝadon, estis deciditaj en Montrealo, sidejo de la ICAO (Internacia Civila Aviada Organizaĵo), parto de la UN-sistemo. Montrealo ankaŭ estas la sidejo de la Statistika Instituto de Unesko.





Diversaj prelegoj pritraktos la temon "UN 75-jara: Dialogo kaj interkompreniĝo en ŝanĝiganta mondo", substrekante la gravecon de UN por internacia kunlaboro kaj paco en la mondo. La kongresan temon gvidos Humphrey Tonkin – kaj la montreala

UK estos brila okazo lanĉi seriozan dialogon pri UN, ĝia estonteco kaj kion la kongresanoj opinias pri tiu estonteco — do, vi havos okazon ne nur lerni, sed aktive partopreni. Ĉi-kongrese la kongresa temo ne estos simple iu garnajo de la kongresa semajno, sed

tute kerna demando. La partoprenantaro ankaŭ lernos pri la UN-celoj pri daŭripova evoluo, kaj la kongreso strebos ligi Esperanton kaj lingvajn temojn al tiuj celoj. Justa komunikado kaj respekto al lingvoj kaj kulturoj ja devus esti grava parto de pli egaleca mondo. Eble UN mem povus lerni kelkajn aferojn de pli malnova organizo, kiu same celas internaciecon kaj pacon...

Verka maratono

Diversajn artojn oni, kompreneble, prezentos, kiel dum ĉiu UK. Sed ĉu vi ŝatus krei verketon dumkongrese? Ĉi-jare, la UK proponos verkan maratonaĵon de noveloj, laŭ ideo lanĉita de kebekiano, kiu ŝatus antaŭenigi verkan arton en Esperanto. Ne estas pli kreiva kunteksto ol kulture buntaj kongresanoj, sin esprimantaj en komuna lingvo – Esperanto! Dum la UK en Montrealo, arto, do, estos duvoja. Oni ne nur ricevos ĝin, oni kreas ĝin! Se vi estas verkema, nepre partoprenu. Kiu scias, eble vi gajnos premion!

Internaciaj Ekzamenoj de ILEI/UEA. Gvidilo al la elementa kaj meza niveloj kun celaro, postularo, regularo kaj specimenaĵoj. Rotterdam, 2008 (3a eld.), UEA/ILEI. 38 paĝoj, 21 cm. 4,50 €, triona rabato ekde 3 ekz.



Oficiala Informilo

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA



DUMVIVAJ MEMBROJ

Brazilo: J.J. Lunazzi.
Usono: T. Tikker.

SOCIETO ZAMENHOV

Aŭstralio: H. Green.
Belgio: B. Indestege.
Brazilo: F. Maia Jr.
Francio: A. Léonard.
Germanio: P. Kühnel.
Hispanio: J. Franquesa Solé.
Kanado: B. Crisp, M. Fettes.
Svedio: M. Häggström.

PATRONOJ de TEJO

Aŭstralio: B. Lang.

Belgio: B. Indestege.
Brazilo: M. Barcellos,
J. Calegari, F. Maia Jr.
Hispanio: S. Vives i Gómez.
Kanado: M. Fettes.
Pollando: R. Williams.

DONACOJ

Ĝis la 5-a de marto

Konto Afriko

Aŭstralio: H. Green 100,00.
Brazilo: J. Calegari 49,52.
Finlando: Anonima 10,00.
Sumo ĉi-jara: 409,25.

Fondaĵo Canuto

Aŭstralio: H. Green 100,00.
Finlando: S. Mynttinen 500,00;
Anonima 12,00.
Francio: J. Durin 11,00.
Luksemburgo: I. Ertl 20,00.
Nederlando: R. Moerbeek 25,00.
Sumo ĉi-jara: 2100,00.

Konto Informado (ĉiuj por PolandRock)

Francio: D. Janot 500,00.
Italio: G.C. Fighiera 50,00.
Japanio: G. Pompilio 30,00.
Svedio: H. Häglund 20,00.
Svisio: H-U. Jucker 40,71.
Sumo ĉi-jara: 640,71.

Fondaĵo Junularo

Italio: G. Pflieger 47,62.
Sumo ĉi-jara: 47,62.

Fondaĵo Wüster

Brazilo: A.C. Pontes dos

Santos 82,15.
Sumo ĉi-jara: 82,15.

Ĝenerala kaso

Aŭstralio: H. Green 100,00.
Barato: P. Dasgupta 365,00.
Brazilo: A. Fonseca de Melo 29,56; F. Maia Jr. 59,12.
Britio: J. Hubert 9,52;
A. Prent 27,18.
Francio: D. Janot 366,00.
Germanio: S. Grotz 29,20;
M.N. Lins 24,27.
Luksemburgo: B. Moon 62,00.
Nederlando: R. Moerbeek,
F.D. van Zoest – po 25,00.
Pollando: I. Koutny 365,00.
Usono: R. Glossop 9,03;
D. Halley 225,80;
H. Tonkin 200,42.
Div. malgrandaj: 6,00.
Sumo ĉi-jara: 2987,01.

Letero el Goma

■ Augustin Kkozwa

Saluton, karaj!

Mi ege dankas vin por via emo kaj ke vi pensas pri niaj agadoj kun georfoj, vi ĉiam estos informataj kiel ni evoluos, ĉar ni ofte raportos al vi.

Mi volas iomete prezenti min kaj la georfojn al vi:

1. Pri mi: mi estas instruisto de Esperanto al tiuj ĉi georfoj ekde 2004; kiel honorofica volontulo mi instruas ilin, do sen salajro, ĉar en Esperantujo ne estas ia oficejo kiu pagus salajron. Sed mi fieras kaj kontentas, kiam miaj malnovaj gelemantoj povas nun flue paroli Esperanton. Mi mem studas por iĝi kuracisto.

2. Pri la georfoj: ni troviĝas en la urbo Goma, en la orienta parto de nia lando DR Kongo, kie ĉiam okazas senĉesaj militoj jam de pli ol 20 jaroj. Tial mi instruas amason da georfoj, kies gepatrojn oni mortigis dum la militoj.

Ni ilin protektas kaj sekurigas, sendas ilin al lernejo kaj instruas al ili Esperanton dank' al nia Esperanto-asocio, kiun ni kreis en la jaro 2004 por la ĉefa celo savi kaj protekti tiujn georfojn, lukti kontraŭ la malriĉeco kaj realigi amasajn projektojn, kiujn ni daŭre havas. Ili daŭre bezonas manĝaĵojn, pagon por la lernejo, vestaĵojn, materialojn por la lernejo kaj ankaŭ loĝlokon – orfejon.

La asocion nian ni komencis kun la helpo de forpasintoj: la Pastro Duilio Magnani el Rimini, Italio, kiu multe helpis al tiuj ĉi georfoj de 2004 ĝis 2008 (kiam li forpasis).

Kion li faris por helpi? Li kutimis afiŝi fotojn de la georfoj sur la preĝejoj muroj kaj bonkoruloj kutimis elekti inter ili georfojn laŭ siaj deziroj kaj adoptis ilin. Post la adopto ili helpis sendante monon por subteni la edukadon de iliaj geadoptitoj ktp.

Tiuj unuaj georfoj de siatempe estas nun kreskintaj georfoj kaj jam progresis en siaj studadoj. Post la forpaso de la Pastro Duilio Magnani ni havis ankoraŭ la karan Hans Bakker el Nederlando, kiu ankaŭ multe helpis al tiuj ĉi georfoj. Li asignis subvenciojn dum jaroj por subteni tiujn ĉi georfojn; bedaŭrinde post lia forpaso en la jaro 2015 lia vidvino ne kapablis daŭrigi la helpadon; tial ŝi devis decidi ĝin haltigi ĉi-jare, en 2019, kaj ŝi sendis unu lastan monsumon, per kiu ni povis pagi la lernejajn kostojn por kelkaj georfoj por la antaŭa lernojaro.

Por ĉiuj georfoj ni nun urĝe klopodas akiri kaj trovi novajn subtenantojn, por ke ni kovru ĉi-tiun lernejan jaron (2019–2020) kaj ankaŭ por la estonteco.

Krom la helpo de la vidvino Bakker ni akiris ankaŭ aliajn helpetojn de niaj Esperantaj geamikoj, tial ni povis pagi lernejajn materialojn por la georfoj (uniformoj, sakoj, kajeroj ktp.) por la lernejojaro 2018–2019. Bedaŭrinde unu alia el tiuj helpantoj niaj forpasis dum la lasta marto. Li estis el Italio, lia nomo estis Giovanni Daminelli.

Ni ne havas, nek povis jam konstrui orfejon, pro manko de mono, nur la jamaj forpasintoj, menciitaj supre bonkoruloj, jam pretis financi niajn projektojn. Ni ĉiam klopodas ankaŭ trovi

iajn fondaĵojn aŭ organizojn por financi kaj helpi nin efike, sed ĝis nun ne sukcesis.

Tiam por la venonta jaro 2019–2020 ni klopodis kiel akiri lernomaterialojn, kaj faris buĝeton pri tio, kiun ni dissendis tien kaj tien, feliĉe iuj bonkoruloj zorgis kaj donacis laŭ siaj ebloj; tial ni nun povis ricevi almenaŭ lernejajn materialojn por la nova lernejojaro.

Sed la tempo flugas, kaj la georfoj komencis la studojn lundon, la 2-an de septembro 2019. Do nun urĝas, ĉar ni devas nun pagi por ilia lernejojaro.

Nun kion ni bezonas?

En nia lando la edukado de la georfoj estas pagenda, de la bazaj lernejoj ĝis la universitatoj. Ĉar ili ne ricevas salajron de la registaro, la instruistoj devigas la parencojn pagi kaj subteni la edukadon de iliaj geknaboj, pagante tion kion oni nomas tie ĉi franclingve „primes“ (en Esperanto – “premioj”).

Kiel menciitas, ni ne havas orfejon kaj ankoraŭ ne trovis financadon por konstrui ĝin, tial la georfoj devas nun loĝi ĉe gastigantaj familioj, kio estas malfacila por ĉiuj.

Ni havas multajn georfojn, kiuj ĉe estas la Esperanto-kursojn, sed pro manko de rimedoj ni ne kapablos subteni ĉiujn, tial ni decidis elekti nur kelkajn el ili:

- 50 georfojn ĉe la bazaj lernejoj;
- 30 georfojn ĉe la mezlernejoj;
- 6 georfojn ĉe la universitato.

La georfoj eklernis kaj ŝategas Esperanton, ĉar ĝi estas bela lingvo, facila, ĝi unuigas la homajn korojn, pacigas, amikigas en la spirito de Zamenhof.

Por pliaj informoj kaj se vi volas helpi al nia agado, kontaktu augukako@gmail.com.



“Teo kaj Amo: Interkultura Dialogo”

Evento de Esperanto-Grupo Giorgio Canuto por Parmo Kultura Ĉefurbo 2020

■ Alessandra Madella

La evento “Teo kaj Amo” de la Esperanto-Grupo Giorgio Canuto de Parmo okazis posttagmeze de sabato, la 8-a de februaro 2020, en la Ĉina kaj Etnografia Arta Muzeo de la urbo. Longa laboro de organizado daŭrinta preskaŭ unu jaron permesis al ni kunlabori kun la Interreligia Forumo kaj pli-malpli dudek lokaj asocioj ĉirkaŭ ĝi. Dank’ al ĉi tiu engaĝiĝo nia evento estis inkludigita en la oficialan kalendaron por Parma Ĉefurbo de Kulturo 2020. Siavice tio faciligis nian disvastigan laboron per flugfolioj en lernejoj kaj bibliotekoj, sed ankaŭ per la retroŝta listo de la Ĉina Muzeo, kiu atingas 5 000 membrojn. Signifa rezulto estis anonco de nia evento en la retejo de la itala Ministerio por Kulturaj Heredaĵoj kaj Agadoj kaj Turismo. Ankaŭ la aktiva partopreno de italaj kaj eksterlandaj universitataj instruistoj permesis al ni teni la nivelon alta kaj ricevi la patronecon de la Rektoro de la Universitato de Parmo kun la rajto uzi ĝian logotipon sur niaj afiŝoj.

Malgraŭ la alarmo pro la korona viruso, kiu malfaciligis aferojn por evento kiel la nia, ĉefe bazita sur ĉinaj kaj aziaj kulturoj, la partoprenantoj plenigis ĉiujn 50 sidlokojn haveblajn en la kunvena salono de la Ĉina Muzeo. La programo prezentis originalajn esploradojn, kiuj povis kontentigi la plej kleran publikon, tamen pere de nova prezenta stilo (kiel lumbildoj kaj daŭra interagado kun la ĉeestantoj) por pliiĝi la klarecon de la ekspozicio kaj konservi intereson. Kiel substrekis en siaj enkondukoj d-ro Luciano Mazzoni-Benoni, prezidanto de la Interreligia Forumo, kaj pastro Gustavo Zanolli, prezidanto de la Esperanto-Grupo Giorgio Canuto de Parmo, la temo de teo fakte kreis simpozion: trinki kune, kio signifas ankaŭ pensi kaj paroli kune.

La posttagmezo komenciĝis per mergiĝo en Esperanton dank’ al la filmetoj de la konkurso “Mia Asocio, Mia Urbo” de Ĉina Radio Internacia. Dum la publiko alvenis por ĝui ĉinajn kaj japanajn dolĉaĵojn kaj teon, ni bonvenigis ĝin per amatoraj filmoj en la lingvo de Zamenhof el Uzbekio, Paragvajo kaj Parmo. Mia prezentado pri la vivo kaj kinarto de Norman McLaren (la plej elstara animaciisto de la Nacia Filmoficejo de Kanado) montris la uzon de Esperanto en Oscar-premiita animacio kaj malkaŝis kiel la reĝisoro mem studis la lingvon en sia juneco. Mi kaptis la okazon por substreki la intereson de kanadaj filmfaristoj pri Esperanto dank’ al la baldaŭa Universala Kongreso en Montrealo. La publiko povis vidi Esperanton ankaŭ en parto de la lumbildaj prezentadoj de la aliaj prelegantoj kaj en la subtitoloj de tri filmoj pri Yunnan-aj nacioj, kiuj ebligis memori la rolon de la internacia lingvo en la subtenado de la rajtoj de lingvaj minoritatoj.



La tuta programo pri Yunnan-estis preparita de instruistoj kaj profesiaj reĝisoroj de la Artkolegio de Kunming (Tan Zhongqi, Yu Mei, Zhang Di, Duan Jike kaj Zheng Nanxi), kiuj bedaŭrinde ne povis partopreni persone pro la situacio de internacia hao-

so, kaŭzita de la epidemio de la korona viruso. Tamen la materialo preparita estis tiel altnivela, ke la spektantaro kunklakigis siajn manojn kaj ne ŝparis komplimentojn, kiam ni prezentis ĝin anstataŭ ili.

Du Xin, profesorino pri sociologio en la Departemento de Juro de la Universitato Keio, venis el Japanio por prezenti sian originalan studon pri la rilatoj inter ĉinaj kaj japanaj fervoruloj de japanaj bildstrioj kaj animacioj, kun aparta fokuso pri la serio “La Kavaliroj de la Zodiako”. Ŝia prezentado okazis en la japana kun interpretado en la italan por doni al la publiko la ŝancon aŭdi kaj aprezi azian lingvon, krom la ĉina de la filmetoj. Sara Bellettato, instruistino de la unua taj-lingva kurso en itala universitato (Ca’ Foscari de Venecio), ilustris la historiajn, religiajn kaj kulturajn faktorojn, kiuj igas teon grava niĉa produkto en Tajlando, sed ne tre disvastigata tra la plimulto de la loĝantaro.

Kiel Profesoro Wolfgang Huemer de la Universitato de Parmo resumis en siaj finaj filozofiaj komentoj, ekde Esperanto al japanaj bildstrioj, ĉiuj niaj kontribuoj montris, ke estas forta deziro por interkultura komunikado kaj ke precipe junuloj trovas la plej diversajn rimedojn realigi ĝin. Ni ankaŭ povas konsideri parto de tiu strebo la “orientan dancon kun ĉina pluvombrelo”, per kiu Paola Tosato, la juna prezidantino de la esperantistoj de la urbo Padova, finis nian posttagmezon de prezentadoj.

La pozitivaj reagoj, kiujn la evento ricevis de la publiko, sendube faciligos estontajn kunlaborojn kun aliaj lokaj asocioj kaj malfermas al ni pli rektan komunikadon kun la loka administracio kaj aliaj institucioj. Certe nia klopodo donis grandan videblecon al Itala Esperanto-Federacio, kiu parte sponsoras nian agadon, kaj al la Esperanto-Grupo de Parmo, kiu sukcesis organizi altnivelan eventon malgraŭ internaciaj malfacilaĵoj.

Rado de vivo

Valentin Melnikov

Bobbie Wilmina. *La amo-rado*. Pisa, Edistudio. 2019. 60 paĝoj. Prezo ĉe UEA: 15,00 €

En 1932 aperis la famaj "Sekretaj Sonetoj", kiuj certe ŝokis la tiaman publikon. Tial Kálmán Kalocsay ne riskis aperigi la libron sub sia vera nomo, uzis pseŭdonimon, "Peter Peneter". En 2002, laŭ manuskripto verkita en 1954, aperis (bedaŭrinde, etkvante kaj grandpreze, tial malpli konata) sonetaro "La sekreta psiko", verkita de "Evo Sveti Vrag", kiel virina aldonaĵo/kompletigo/versio – aŭ, laŭ la vortoj de Christian Declerck "...ina kontraŭparto, simetriaĵo, vera parulo de la sonetaro de Peter Peneter...". Ke la duan libron reale verkis Marjorie Boulton, oni eksciis nur post ŝia morto.

Aliaj tempoj – aliaj moroj. En 2010 enmondiĝis krude erotika (preskaŭ pornografia) romano de Darik Otira (pseŭdonimo de ĝis nun nekonata persono) "Vojaĝo al kuniĝo" ("Konfesoj de seksobsedito"), kiun mi siatempe recenzis*. Do tute ne mirindas apero de "virina versio" ankaŭ de tiu romano: de iu Bobbie Wilmina "La amo-rado".

Simpla vortludo-metaforo: amo/amo-ro kiel peza nehaltigebla rado ruliĝanta tra la vivo. Jam la unua frazo frapas,

venigante en la etoson: "Mi festis mian dekkvaran naskiĝdatrevenon per la nasko de mia dua infano." Nekredeble? Legu plu la membiografion/taglibron de voluptema junulino, devenanta de eta kariba insulo, ŝokiĝu plu. Tamen, ĉio priskribita estas psikologie versimila kaj konvinka.

La aventuroj estas ne nur seksaj. Ŝi diligente lernas, studentiga eks-terlande, studas muzikon kaj inĝenieradon, poste eĉ sukcese lernas piloti aviadilon. "Mia kutima voluptemo provizore dormadis kaj mi ne volis en tiu momento reveki ĝin; mi konstatis kiom pli da koncentriĝo kaj tempo mi havas kiam ne estas tiom da tiaj distraĵoj". (p.25) Dank' al sia talento, laboremo, obstino kaj impertinento (en bona senco) ŝi atingas ĉion... nur pri familia feliĉo ne ĉio glatas. Ĵaluzo, trompoj kaj blufoj, venĝo de eks-amanto... kaj ŝokaj informoj pri propraj gefiloj. Ni observas la protagonistinon ĝis ŝia proksimume 50-jara aĝo, kiam ŝi refoje frontas jam spertitan ŝokan problemon...

Priskribo de seksumadoj okupas ne tiom multe da loko. Ĉeestas meditoj, kaj eĉ popularaj klarigoj pri aviado, pri patentoj kaj financoj. Eĉ se iu hazarde ne scias, kio estas Fejsbuk – jen estas bazaj informoj.

La aŭtoro, kiu ajn ŝi/li estas, libere posedas Esperanton, kvankam eraretoj ie-tie videblas. La stilo, tamen, ne tute glatas: "Kiel lia sola heredanto mi havis la taskon prizorgi ĉiujn postmortajn taskojn" (p.40); "Mi ĉiam estis




suspektinta ke mi neniam estis pli ol petoliga distrilo por Andreo". (p.53) Laŭ formoj kiel "mi prenis el mia mansaketo mian lipruĝon" (p.59) ks eblas diveni la denaskan lingvon de la aŭtoro.

Kiu legos la libron? Certe la ĝunuloj, kiuj krom kontentigo de siaj seksaj deziroj ricevos iom da ĝenerala utilaj scioj, kaj eble la ekzemplo de studemo-laboremo kaj obstino instigos ilin mem fari bonan karieron. Niaj libroj estu plej diversaj, samkiel en ĉiu alia lingvo.

Ne supozu, ke Esperanto-beletron verkas kaj legas nur malmojosaj frid-pisuloj...

* *Beletra Almanako 8*, ankaŭ en la reta katalogo de UEA

Edistudio
www.edistudio.it
Esperanto-eldonejo ekde 1977




Tibor Sekelj
Mondo de travivaĵoj
rakontoj
€ 12,00
ISBN 88-7036-012-1


Literaturo



Baldur Ragnarsson
La lingvo serena
plena verkaro
€ 18,00
ISBN 9788870360783




Spomenka Ŝtimec
Ombro sur interna pejzaĝo
romano
€ 12,00
ISBN 88-7036-019-9



L.L. Zamenhof
Fundamento de Esperanto
redaktis A. Albaut
€ 18,00
ISBN 9788870360776

Silver
Lupo Alberto
Bildrakonto
€ 7,50
Bildstrioj
ISBN 9788870360868



Piero Nissim
Mayn Lidele
KD de tradiciaj kantoj,
kun tekstoj
€ 15,00
ISBN 9788870368147

Muziko

Triona rabato por mendo de minimume tri ekzempleroj de la sama libro sendotaj al la sama adreso.
Menu ĉe la retpaĝo www.edistudio.it aŭ per retpoŝto al esperanto@edistudio.it

Etaj brikoj en la muro...

■ Fernando Pita

**Silva, Benedicto. *Miaj etaj brikoj...*
Brazilio: BEL, 2013. 263 p.
Prezo : 10,50 €**

Dum la lastaj jaroj, oni iom post iom rimarkas, ke la Esperanta literaturo travivas tiun ĉiam tiklan momenton, kiu estas transiro inter generacioj: se la generacio de la aŭtoroj ekaperintaj dum la 60-aj kaj 70-aj jam alvenas al sia kreiva aŭtuno, kaj se la aŭtoroj, kiuj surscenigis sin dum la 80-aj kaj 90-aj jam havas karieron, stilon, vervon stabiligitajn – kaj oni plu rajtas nek atendi, nek postuli de ili novan revolucion verkon por nia literaturo – la nova tvitera generacio ankoraŭ ne okupas la pintpodian lokon.

Tamen, dum tiuj transiraj momentoj, kreiga kvazaŭa vakuo – kaj oni scias ke, samkiel en politiko, ne estas vakuo en arto – kiu donas spacon al alia fenomeno: jen estas, dum la samaj jaroj, iamaniere preparante la bilancon de la foriranta generacio, okazo ke ekaperas svarmo de antologioj, kiuj omaĝas niajn veteranojn, kolektante kaj republikigante tion, kion dum jaroj ili verkis por niaj gazetoj, revuoj, bultenoj ktp. Kompreneble, kiel omaĝoj, tiuj verkoj estas ja ĝustaj kaj justaj; ĉar ĝenerale temas pri homoj kies kvalito, kvankam bona, estis preskaŭ ĉiam ligita al loka aŭ nacia movado, plej ofte tiuj omaĝatoj, kvankam produktintaj verajn perletojn el nia beletraro, estus kondamnitaj al forgeso, se ili ne estus “savitaj” de tiuj antologioj. Kaj pro tiu “regiona” rolo, tiu fenomeno estas perceptebla nur per rekta rigardado ne de la eldona agado de UEA aŭ alia



internacia Esperanta instanco, sed de la landaj aŭ regionaj asocioj.

Prepari tiujn antologiojn, tamen, al siaj organizantoj alportas du defiojn: ĝenerale tiuj tekstoj, kiuj preskaŭ ĉiam temas pri lokaj aŭ naciaj demandoj, movadaj aŭ ne, ne nepre kapablas vekti intereson de eksterlandanoj, aŭ de tiuj, kiuj ne interesiĝas pri la samaj temoj. Kaj, plej grave: kelkfoje estas tre malfacile trovi, en rikolto de tekstoj verkitaj laŭlonge de jardekoj, kaj kelkfoje en tre malsimilaj personaj cirkonstancoj, unu kondukan fadenon, kiu faru el tiu tekstaro tutaĵon. Feliĉe tiuj du defioj estis bone venkitaj en la antologio *Miaj etaj brikoj...*, antologio dediĉita al la verkaro de la brazila veterana aŭtoro Benedicto Silva: ne nur unu, sed du fadenoj estas en la libro!

Kiel sciante tra Esperantujo, plejparto de la brazilaj esperantistoj, pre-

cipe la plej aĝaj, – estas ja spiritistoj! Kaj tio vekas scivolemon inter alilandaj esperantistoj (Iam, dum Arkones, alilandanoj kvazaŭ police pride mandis min pri tiu religio, al kiu mi ne apartenas...) kiuj, krom la verkoj de Allan Kardec, malmultajn informojn trovas pri tio kiaj estas la mondvizio kaj kredoj de ties sekvantoj. Kaj, ĉar Benedicto Silva estas aŭtoro kiu, laŭlonge de sia vivo, tenis sin fidela al Spiritismo (li estas unu el la plej gravaj spiritistoj de nia nacia Esperanto-movado), la leganto facile trovos, inter liaj tekstoj, diversajn rikoltojn de psikografiitaj tekstoj, spiritismaj mesaĝoj ktp., kiuj donos al alilandaj esperantistoj portreton de la esperantista-spiritisma simbiozo ekzistanta en Brazilo.

Plie, se oni ĉiam diradas ke “religio estas afero bona por homo”, kial ni devas havi nur unu? Kaj jen la dua fadeno de la libro: svarmas en la libro informojn pri la *dua* religio de la aŭtoro: la japandevena Oomoto, kiu por multaj el ni, estas iom mistera afero, pri kiu estas eĉ iom pli malfacile informiĝi ol pri Spiritismo, ĉar for de Japanio ĝi estas malmulte disvastigata, for de la japanaj enmigrintaj nukleoj. Kaj la libro, iel iomete senvualigas tiun religion por la legantoj. Ja la etaj brikoj de B. Silva konstruas veran muron sur kiu montriĝas veraj klasoj pri la historio de Oomoto kaj pri ĝia transplantado al Brazilo.

Kompreneble, tiuj du fadenoj ne nur komplementas sin, sed intermiksiĝas kaj kreas tre interesan rezulton, kiu iom forviŝas la tradukojn de kelkaj paĝoj de la brazila literaturo, kaj, malfeliĉe, la verkoj propraj de la aŭtoro mem, kiuj ja meritis pli fortan atentigon.



Tiuj, kiuj deziras recenzi por la revuo Esperanto, estas invitataj kontakti la redakcion ĉe revuo.esperanto@gmail.com aŭ pere de la poŝtadreso, indikita en la kolofono.

Tiuj, kiuj ricevis varon por recenzo, estas petataj sendi la recenzon aŭ kontakti la redakcion. Varojn ricevitaĵajn kaj nerecenzitajn oni fakturos al la ricevinto.

Reta Revuo kalejdoskope

En la marta numero 2019 de la revuo *Esperanto* (p. 51) vi povis legi detalajn artikolojn pri tio, kio estas la Reta Revuo (<https://revuoesperanto.org>) kaj kiel ĝi evoluas. Ni kolektis ligilojn al kelkaj publikajoj, preparitaj speciale por la Reta Revuo, kiuj eble interesos vin.

Monda Kulturo

Tiu ĉi rubriko de la Reta Revuo estis lanĉita laŭ la iniciato de la estrarano de UEA Fernando Maia Jr. (legu pli detale en la marta numero 2019 de la revuo *Esperanto* (p. 54)).

Butersemaĵna karnavalo



Dima Ŝevĉenko prezentas la artikolon pri ero de la rusa kulturo – Butersemaĵna karnavalo, kiu estas okazigata fine de februaro – komence de marto. Dum ĝi oni adiaŭas la vintron, bruligante ĝian remburitan figuron, ĝissate manĝas bli-nojn (krespojn), aranĝas plurajn ludojn kaj konkursojn, kantadas kaj dan-cadas.

La aŭtoro ankaŭ iom rakontas pri sia propra sperto de vojaĝo al la Butersemaĵna karnavalo, kiu okazis en la vintra arbaro, malproksime de la urbo.

<https://revuoesperanto.org/butersemaĵno>

Japana tradicia teatro “noo” – ĉu nur teda?

Noo estas tradicia japana teatro, kiu estiĝis en la 14-a jarcento. Ĝi estas muzika teatro, en kiu oni uzas maskojn. Bedaŭrinde noo havas la reputacion, ke ĝi estas teda. Kimura Goro Chri-

stoph el Japanio pravas, ke tio ne estas la vero.

<https://revuoesperanto.org/noo>



Turismo

Mia travivaĵo de Esperanta Vojaĝo

Wu Hanping (Harpina) el Ĉinio estis profunde impresita dufoje de siaj Esperantaj vojaĝoj. Ŝi detale dividas kun ni siajn spertojn pri vizito de kelkaj landoj kaj renkontiĝoj kun esperantistoj tie.

https://revuoesperanto.org/voja%C4%9Doj_harpina



Floroj sur koro-forma brulligno

Opinio

Pri la Alvoko al la Diplomatoj de L. L. Zamenhof

Vinko Ošlak el Aŭstrio analizas el sia vidpunkto la artikolon “Post la granda

milito. Alvoko al la diplomatoj” de L. L. Zamenhof, kiu aperis en *The British Esperantist* en 1915.

https://revuoesperanto.org/brita_esperantisto



Beletra rubriko

Nokta Monteto

“Nokta Monteto” estas malgranda rakonto de Misaŭa Seiiĉirou, verkita kadre de la 30-jariĝfesto de la rondo “Esperanto-Klubo de Maĉida” en Tokio, Japanio, kiu naskiĝis la 10-an de junio 1990.

https://revuoesperanto.org/nokta_monteto



Ankaŭ vi povas esti aŭtoro de la Reta Revuo!

Por kontribui, skribu al la redakcio

redakcio@revuoesperanto.org

(kun noto en la titolo “Reta Revuo”).

Kalejdoskopo

Edukado.net donas konsilojn pri la distanca instruado de Esperanto

Sciante ke en plurdekoj da landoj estas krizsituationo pro la kronviruso kaj eble estos ankoraŭ en pliaj aliaj landoj, kies konsekvenco estas, ke pluraj Esperanto-aranĝoj estas kaj estos nuligitaj, sekve ni devas trovi manierojn ne lasi perdiĝi niajn kursanojn.

Eĉ se vi ne povas fizike renkontiĝi, ne nepre necesas interrompi la instruadon kaj ekzercadojn.

Edukado.net havas multajn eblojn por provizi la kursanojn per materialoj por ke ili ne enuu. Ni povas doni ankaŭ specialajn spacojn en la *Klerigejo*, kien eblas alŭti serion de prelegoj kaj materialoj, se iu tiel volas rekompenci siajn perditajn kursanojn. Kontakto nin, se vi bezonas kursospacon.

Detalaj informoj:

<https://edukado.net/novajhjoj?id=816>.

Studu Esperanton en Montrealo aŭ Kebekio antaŭ la 105-a Universala Kongreso!



Ĉu vi volas plibonigi vian fluecon en Esperanto antaŭ la 105-a UK en Montrealo? Du intensivaj dutagaj kursoj estas proponataj ĝuste antaŭ la evento – unu en Montrealo kaj la alia en Kebekio: <https://esperanto2020.ca/fr/apprendre-lesperanto>.

En Montrealo: klasoj komenciĝos vendrede matene (la 31-an de julio) kaj finiĝos posttagmeze sabate la 1-an de aŭgusto, ĝustatempe por ĉeesti

la programon de la Kongreso. La lecionoj estos gvidataj de du elstaraj instruistoj, Katalin Kováts kaj Sylvain Lelarge: https://www.esperantic.org/en/montrealo_2020/#Francais.

En Kebekio: kursoj proponataj dum la lastaj du tagoj de la konferenco de Internacia Ligo de Esperanto-

Instruistoj, kiu okazos en Kebekio la semajnon antaŭ la Universala Kongreso en Montrealo:

<https://www.ilei.info>.

Gratulon, Eduardo Larrouy!

La 9-an de marto Eduardo Larrouy, la plej veterana ano de Hispana Esperanto-Federacio kaj probable la plej veterana esperantisto en la mondo, fariĝas 107-jara. Seninterrompe membro-abonanto de Universala Esperanto-Asocio, li loĝas en Bilbao, plu viglas kaj bonege parolas la lingvon. UEA kore dankas al HEF pro la kunvivado kun tiu speciala membro.



La 8-an de marto la ĵurnalo *Deia* publikigis raporton pri li, ĉefe liaj travivaĵoj dum la hispana milito, kun foto de tiu tempo: <https://tinyurl.com/qqc2rxy>.

UEA kune kun HEF gatulegas al li, nome de ĉiuj anoj de Hispana Esperanto-Federacio kaj de ĉiuj esperantistoj en la mondo!

Pri Eduardo Larrouy en Esperanta Vikipedio: https://eo.wikipedia.org/wiki/Eduardo_Larrouy.

UEA kaj la virina agado

La 8-an de marto en sia Instagram-konto UEA aperigis du gravajn historiajn fotojn pri la virina movado kaj pri la partopreno de virinoj en bezonataj sociaj ŝanĝoj: <https://instagram.com/uea-esperanto>.

Tio estas la plej simpla maniero agnoski kaj memori la gravecon de virinoj en ĉiuj niaj vivkampoj. UEA restas je plena dispono por utili al esperantistinoj tra la mondo kaj al ĉiuj esperantistoj interesataj de pli egaleca kaj solidara socio.

Gajninto de la konkurso "Mia Asocio, mia urbo"

La filmeto "Minga Guazú" de Alexandra Mendieta gajnis la unuan lokon en la konkurso "Mia Asocio, mia urbo". Ĉu vi jam spektis ĝin? Per ĝi vi konatiĝos kun la urbo Minga Guazú kaj kun la agado de la aktivulino Alexandra Mendieta por la renaskiĝo de la Esperanto-movado en ŝia lando. La nomo Minga venas el la keĉua lingvo kaj signifas "kolektiva laboro". Guazú estas sufikso komuna al pluraj indiĝenaj lingvoj de Sud-Ameriko kaj signifas "granda". Ni esperas



plian fruktodonan grandigon de tiu laboro kaj kompreneble plenan sukceson de la kolektivo en Paragvajo. Gratulon al Alexandra kaj al la paragvajaj esperantistoj!

Spekti la filmeton eblas ĉi-tie: <https://tinyurl.com/v6osyr9>.

Seminario pri interlingvistiko kaj planlingvoj

■ Kristin Tytgat

La 21-an de februaro 2020 la Vrije Universiteit Brussel (VUB – Libera Brusela Universitato) organizis seminarion pri interlingvistiko kaj plan-



lingvoj. Post enkonduko en la mondon de la planlingvoj, farita de d-ro Federico Gobbo el la Universitato de Amsterdamo, okazis fulmokurso kun la prezento de Esperanto kaj debato pri la neŭtrala mondlingvo en kvar laborgrupoj.

Sesdeko da studentoj kaj docentoj ĉeestis la aranĝon. Ili aktive partoprenis la fulmokursojn kaj poste havis interesajn demandojn. Ĝenerale la publiko reagis entuziasme al la aranĝo.

La 19-an de marto la Université Libre de Bruxelles (ULB – Libera Bru-



sela Universitato) organizos konferencon pri Esperanto.

Estas la intenco estontece organizi en ambaŭ universitatoj babilrondojn en Esperanto paralele al tiuj en aliaj fremdlingvoj.

Eventoj

Komuna staĝo inter koreaj kaj tajvanaj esperantistoj malgraŭ minaco de la korona viruso!

■ Reza Kheirkhah

Inter la 6-a kaj 12-a de februaro okazis daŭra aktivado inter 7 koreaj kaj 13 tajvanaj esperantistoj en la suda urbo Pingtung (Pindon) en Tajvano. Partoprenis ankaŭ 22 neesperantistoj. Ni akceptis 6 koreajn esperantistojn ĉe la flughaveno Kaohsiung, kiu situas je unuhora distanco de Pingtung. Kaj la 7-a koreo mem venis el Tajpeo al la sudo.

En la tria tago, la 8-a de februaro, okazis la kulmino de la agadoj kaj por la tuta tago koreoj kaj tajvananoj preparis diversajn aĵojn por prezenti siajn kulturojn.

La elementa lernejo Fuxia, kiu estas eksperimenta lernejo kaj apartenas al la universitato Pingtung, disponigis du grandajn ĉambrojn por nia agadaro. Koreoj pendigis belajn koreajn aĵojn, inkluzive de ventumiloj, vestaĵoj tradiciaj kaj tajvananoj preparis belajn poŝtkartojn, kolektitajn dum jaroj en interŝanĝo kun alilandaj esperantistoj; indiĝenajn metiaĵojn kaj kostumojn; kaj ekspozicieton de esperantaĵoj.

Dum la tuta tago estis programeroj, ekzemple: farado de koreaj tradiciaj ventumiloj pere de Radiko kaj Esther, la gvidanto de la korea grupo; prononco de Esperantaj literoj, ĉefe tiuj malfacilaj, pere de Benjamin Irwin, ka-

nadano loĝanta en Pingtung; prezento de Internacia agado de poŝtkart-kruĉado, kiun zorgis Ingrid Chuang, Esperanto-instruisto; sorto-diveno per Chi-Ghin, ĉina tradicia maniero pere de Prof. Cho (konata kiel Abengo); kaligrafiado pere de s-ino Wu Meilian; farado de indiĝenaj braceletoj pere de s-ro Kuang-fu Hsu; senpaga masaĝo pere de Kevin Shih, loka aktiva esperantisto; prezento de lokaj indiĝenaj vestoj pere de Lolo; kaj fine Yvonne Chen invitis ĉiujn kune fari jogon, kiu allogis multajn. Post tio ni moviĝis al unu el la plej malnovaj preĝejoj en Tajvano, kie pastro Marko Chen (usonano) Esperante kaj ĉine gvidis la partoprenantojn tra la sola biblia biblioteko en Tajvano, kie troviĝas centoj da biblioj en multaj lingvoj.

En la postaj tagoj koreaj esperantistoj, akompanate de Chen Liru, loka aktivulo, vizitis kelkajn interesajn partojn de Tajvano.

Tiu ĉi staĝo estis la dua inter koreaj kaj tajvanaj esperantistoj kaj ĝi okazis malgraŭ la minaco de la korona viruso, kiu regas kaj minacas en la landoj ĉirkaŭ Tajvano!



LA MEMBRARO DE UEA EN 2019

Lando	AM	IM	Sume	Lando	AM	IM	Sume
Alĝerio	0	5	5	Kolombio	25	16	41
Albanio	19	11	30	Komoroj	0	2	2
Angolo	0	3	3	Kongo (Dem. Resp.)	25	50	75
Argentino	100	25	125	Kongo (Resp.)	0	3	3
Armenio	25	9	34	Korea Resp.	140	91	231
Aŭstralio	73	29	102	Kostariko	25	4	29
Aŭstrio	51	33	84	Kroatio	120	25	145
Bangladeŝo	0	1	1	Kubo	419	31	450
Barejno	0	1	1	Latvio	88	15	103
Belgio	247	104	351	Litovio	115	25	140
Belizo	0	1	1	Luksemburgo	87	13	100
Belorusio	0	6	6	Madagaskaro	25	7	32
Benino	25	36	61	Malajzio	0	1	1
Birmo	0	1	1	Malio	0	2	2
Bolivio	0	2	2	Malto	0	2	2
Bosnio-Hercegovino	100	14	114	Maroko	0	4	4
Brazilo	37	299	336	Meksiko	50	55	105
Britio	272	93	365	Mongolio	25	9	34
Brunejo	0	1	1	Nederlando	119	144	263
Bulgario	100	29	129	Nepalo	25	28	53
Burkina Faso	0	1	1	Niĝerio	25	9	34
Burundo	330	28	358	Niĝero	0	2	2
Centr-Afr. Resp.	0	1	1	Nikaragvo	0	25	25
Ĉado	0	3	3	Norda Makedonio	25	4	29
Ĉeĥio	40	60	100	Norvegio	97	27	124
Ĉilio	25	9	34	Nov-Zelando	17	13	30
Ĉinio	1241	148	1389	Orienta Timoro	0	5	5
- Honkongo	0	2	2	Pakistano	25	24	49
- Tajvano	0	3	3	Palestino	0	1	1
Danio	69	71	140	Paragvajo	0	1	1
Dominika Resp.	0	10	10	Peruo	25	7	32
Ebur-Bordo	0	1	1	Pollando	247	85	332
Egiptio	0	1	1	Portugalio	0	14	14
Ekvadoro	0	1	1	Ruando	0	2	2
Estonio	0	11	11	Rumanio	18	29	47
Etiopio	0	2	2	Rusio	107	80	187
Filipinoj	0	2	2	Salvadoro	0	2	2
Finnlando	136	92	228	Senegalo	0	21	21
Francio	278	358	636	Serbio	0	22	22
Gabono	0	1	1	Singapuro	0	1	1
Ganao	0	4	4	Sirio	0	1	1
Germanio	520	400	920	Slovakio	16	25	41
Grekio	33	9	42	Slovenio	100	13	113
Gvatemalo	0	2	2	Sud-Afriko	20	6	26
Hinda Unio	25	30	55	Svedio	244	74	318
Hispanio	186	117	303	Svislando	109	80	189
Honduro	0	1	1	Tagikio	25	1	26
Hungario	112	53	165	Tajlando	0	4	4
Indonezio	25	15	40	Tanzanio	0	10	10
Irano	25	25	50	Togolando	25	20	45
Irlando	0	11	11	Trinidado	0	1	1
Islando	20	10	30	Tunizio	0	3	3
Israelo	109	38	147	Turkio	0	14	14
Italio	535	111	646	Ugando	0	2	2
Japanio	694	263	957	Ukrainio	104	37	141
Kamboĝo	0	2	2	Urugvajo	25	14	39
Kameruno	0	4	4	Usono	426	244	670
Kanado	109	62	171	Uzbekio	0	6	6
Kartvelio	25	3	28	Vatikano	0	1	1
Kazahio	0	5	5	Venezuelo	25	2	27
Kenjo	0	1	1	Vjetnamio	75	28	103
Kipro	0	1	1	122 landoj	8654	4162	12816

LAŬKATEGORIA RESUMO DE LA MEMBRO-STATISTIKO

Kategorio	2018	2019
Membro-Gvidlibro	378	10
Membro Baza	1544	1556
Membro-Abonanto	1134	1033
Juna Membro-Gvidlibro	103	-
Juna Membro Baza	340	482
Juna Membro-Abonanto	57	61
Dumviva Membro Abonanto	706	699
Juna Dumviva Membro Abonanto	21	22
Dumviva Membro Baza	230	233
Juna Dumviva Membro Baza	28	28
Honora Membro	33	29
Honora Patrono	7	9
INDIVIDUAJ MEMBROJ	4581	4162
Aligitaj membroj	7402	7340
Junaj aligitaj membroj	1123	1314
MEMBROJ ENTUTE	13106	12816
Dumvivaj Patronoj	3	3
Societo Zamenhof	112	122
Abonoj Esperanto	53	59
Kolektivaj ab. Esperanto	-	-
Abonoj Kontakto	158	159
Kolektivaj ab. Kontakto	12	20
Patronoj de TEJO	52	64
Dumvivaj Patr. de TEJO	22	23
Kotizoj entute	13518	13266

*E*n 2019 UEA havis malpli da individuaj membroj (IM) kompare kun 2018. Entute temis pri 4 162 IM-oj (4 581 por 2018, diferenco de 419). Tio okazis ĉefe pro malgranda UK (904 partoprenis en 2019, kompare kun 1 553 en 2018, diferenco de 649). En kategorio MA okazis modera falo (1 094 kompare kun 1 191 en 2018, diferenco de 97), kio spegulas normalan longperiodan tendencon (falo estis de 124 inter 2017 kaj 2018). Plej multe da IM-oj liveris Germanio (400), Francio (358), Brazilo (299), Japanio (263) kaj Usono (244). Kune kun aligitaj membroj (AM) la tuta UEA-membraro estis 12 816 (13 106 por 2018, diferenco de 327). Malgraŭ la falo la nova kotizsistemo havis pozitivajn aspektojn: 9 landoj (Bangladeŝo, Barejno, Brunejo, Centr-Afrika Resp., Ekvadoro, Etiopio, Gabono, Paragvajo, Trinidado) ĉeestas nian liston ĉi-jare, la membraro en Afriko kreskis 60% (de 145 en 2018 al 234 en 2019) kaj enspezoj pro aliĝoj estis tamen pli altaj. UEA dankas al siaj membroj pro la subteno.

Kontakto

La revuo matura korpe,
juna mense



Abonu papere aŭ elektronike ekde 6 EUR

<http://kontakto.tejo.org/p/abonu-kontakto-n.html>



UEA serĉas profesion kontrevizoron

UEA serĉas profesie kvalifikitan kontrevizoron (CPA aŭ simila kvalifiko, aktiva aŭ emerita laboranto por profesia revizorfirmao, aŭ posedanto de agnoskita revizora servo/entrepreno). La kandidato devas scipovi legi Esperanton.

Ne devas esti nederlandano. Ne povas havi ian oficon, postenon aŭ konsultan rilaton en UEA aŭ TEJO. Ĉiuj vojaĝelspezoj kaj restadelspezoj en Roterdamo pagotaj, kun honorario.

Kandidatiĝproponojn bv. sendi al
uea-prezidanto@esperanto.org